# Ruslando, Pollando kaj la „juda demando“ en la epoko de la naciismo

## Pri la mondo, en kiu L.L. Zamenhof vivis inter 1859 kaj 1917

### Ĝenerala skizo de la epoko

*Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli*

Por prilumi la plej gravajn temojn kaj nomojn kaj la ĝeneralan etoson en Pollando kaj Ruslando, sed ankaŭ la situacion de la judoj antaŭ kaj en la vivotempo de L.L. Zamenhof, kiu dum sia tuta ekzistado moviĝis en tiu tridimensia konfliktotereno, necesas kelkaj klarigoj pri la politika evoluo de la koncernaj landoj kaj popoloj en la 19a jarcento ĝis 1917 en ĝeneralaj trajtoj.
En tio ni supozu, ke la problemoj priskribitaj en ĉi tiu studo estis pli malpli konataj al L.L. Zamenhof. La studo celas ellabori la ĉefajn temojn kaj komplikajn problemojn, kiujn rusoj, poloj kaj judoj en la Ruslanda Imperio alfrontis kaj devis solvi, sed ankaŭ montri la diversajn vojojn, kiujn tiuj tri nacioj, kiuj kunekzistis en antagonisma konflikto, iris. Koncerne la sorton de poloj kaj judoj fariĝas tute evidente, ke tiuj du popoloj aŭ etnoj havis malmulton komunan kaj ne estas kongrue identigeblaj. Rusoj restis rusoj, poloj restis poloj kaj judoj restis judoj. Tiun veron devis kompreni ankaŭ L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, kiun la Esperanto-propagando ofte nomis polo, pola, kvankam en lia kiazo tia etna apartenigo estas maltrafa, ne nur pro tio, ke Pollando ne ekzistis kiel suverena ŝtato kaj polaj civitanoj ne ekzistis. Por kompreni, kial la judo Zamenhof, kiu cetere nomis sin „ruslanda hebreo“, kies patrujo estis „Litovujo“, ne povis esti polo, necesas koni la diferencojn de la historio de la poloj kaj de la judoj en Pollando-Litovujo kaj en la Ruslanda Imperio. Tiu enkonduko troviĝas prologe al la Zamenhof-biografio de A. Künzli (2010), kiu ĝuste celis atentigi pri tiuj historiaj cirksontancoj.[1]

## Ruslando kaj la ruslanda politiko en la 19a jarcento

### Aleksandro Ia

La 19a jarcento estis la epoko de la imperiismo, militismo kaj naciismo. En Ruslando, la unua duono de ĉi tiu jarcento estis karakterizita de la regado de la caroj *Aleksandro Pavlovič Romanov* (1777-25) kaj *Nikolao Aleksandrovič Romanov* (1796-55). Edukita ankoraŭ de sia klerisma avino Katerina IIa kaj politike influita de la radikal-liberalisma sviso F.C. La Harpe, *Aleksandro Ia* entuziasmiĝis por la abstraktaj ideoj de la klerisma movado sen tamen pridubi en si mem la aŭtokratiismon de rusa imperiestro. Eksterlandanoj, aparte germanoj, francoj, britoj kaj kelkaj svisoj, ludis en la administracio, kleriga sistemo, armeo kaj arto de Ruslando konsiderindan rolon, kaj realpolitikistoj influis la eksteran politikon. La kultura moderniĝo, kiu devis pliproksimigi la Ruslandan Imperion al la Okcidenta civilizo, estis limigita al kelkaj supraĵaj sferoj, reduktita al la kleraj tavoloj kaj restis nealirebla por la malkleraj popolamasoj. Ene de la elito perdiĝis la kredindeco de la historia rolo de Petro kaj Katerino, kies politiko estis kritikata kaj de dekstruloj kaj maldekstruloj kiel damaĝa kaj malutila. Sub la egido de la gvidinto de la palaca revolucio, grafo P. Pahlen, kiu alportis la regadon de Aleksandro, kaj ne sen la enflustrado flanke de diversaj progresemaj, liberalismaj konsilistoj el la plej supra ruslanda kaj pola nobelaro, la nova aŭtokrato komencis sian politikan reformagadon, kiu koncernis precipe la agrikulturon, la organizadon de la politika centro de la imperio, la klerigan sistemon kaj la eksteran komercon, kiu havis grandparte simbolan karakteron aŭ parte eĉ nete fiaskis. Krom la formala liberiĝo de la kamparanoj en la baltaj provincoj (en 1802 en Estlando kaj en 1804 en Livlando), la tradicia strukturo de la Ruslanda

[1] Ĉi tiu teksto baziĝas sur la germanlingva kontribuo en mia Zamenhof-biografio (2010) kaj ĉi tie estas prezentita kiel prilaborita versio en Esperanto.

Imperio sub Aleksandro Ia en principo restis konservata en la senco de la 18a jarcento. La dua duono de la regado de Aleksandro estis influita de la aktiveco de reakciaj fanatikuloj. Kun la tolero de plej altaj instancoj, iuj religiaj savmovadoj kondukis al mallarĝa obskura ideologia rigardo, kiu estis importita de iu brita biblia societo. Sub la egido de tiuj reakciaj fortoj (Golicyn, Arakčeev) okazis ideologia subpremado de la akademia libereco kaj politike motivataj persekutoj de multaj, ĉefe eksterlandaj liberalismaj sciencistoj. Krom tio, la cenzuro mallarĝigis la vastiĝantan rusan literaturan merkaton; eĉ verkisto kiel A.S. Puškin (1799-1837), kiu kritikis en siaj poemoj la politikan kaj socian staton de Ruslando. fariĝis viktimo de tiaj reprezalioj. En la ekstera politiko Aleksandro Ia klopodis sekurigi per internaciaj traktatoj la pozicion de Ruslando en la koncerto de la grandpotencoj, t.e. kun napeolona Francio, Britio, Germanio kaj Levantenio. En sia rolo kiel pacaktivulo la caro agnoskis en la Traktato de Tilsit (1807), kiu finis la militon inter Prusujo kaj Ruslando unufanke kaj Francujo aliflanke, la gvidan rolon de Francio en la germanaj landoj kaj konsentis en la Viena Kongreso (1815) pri la fondo de „Pola Reĝlando“, kies konstitucio orientiĝis laŭ la franca modelo. Eŭropo estis praktike dividita laŭ franca kaj rusa influaj sferoj, dum Prusujo ricevis minoran statuson en la koncerto de la grandpotencoj. Post pluraj militaj operacoj, en 1809 Ruslando povis integri tutan Finnlandon en sian imperian teritorion. Sed kun la Otomana Imperio la packlopodoj de la caro restis sensukcesaj. En la tempo de imperiestro Aleksandro Ia okazis la fama „popolbatalo“ apud Lepsiko (1813) kun 520´000 partoprenantaj soldatoj el pli ol deko da popoloj – temis pri la plej granda batalo de la ĝistiama monda historio.

**Nikolao Ia**

Post la mistera morto de sia antaŭulo en novembro (decemro) 1825, lia pli juna frato *Nikolao Aleksandrovič Romanov* (1796-55) kroniĝis kiel nova ruslanda imperiestro anstataŭ Konstanteno, kiu estis antaŭvidita por la sukcedo. Militece trejnata en la kazerno kaj dum multaj jaroj edukata kaj klerigata de iu grafo M.I. Lambsdorff kaj de aliaj germandevenaj instruistoj, *Nikolao Ia* praktike konis nur la medion de la bonorda armeeca mondo de la ordonado kaj obeado, de la devo servadi. Dum la rus-turka milito de 1828 li ankaŭ praktike konatiĝis kun la banala krueleco de la metio, kiun li tiom admiradis. Sian pasion por la armeo li dividis eĉ kun sia edzino Friederike Louise Charlotte, prusa princino, kiu post sia religia konvertiĝo adoptis la nomon Aleksandra Fjodorovna. Jam ĉe la komenco de sia regado Nikolao konatiĝis kun la kruda politika realeco, kiam en decembro 1825 la tiel nomataj dekabristoj (decembristoj) rifuzis ĵuri fidelecon al la caro sur la placo antaŭ la Senato kaj Sinodo kaj lanĉis ribelon. Per tio ili protestis kontraŭ la aŭtokratiisma carisma reĝimo, kontraŭ la servuteco, polica arbitro kaj gazetara cenzuro. Nikolao faris kurtan proceson kun la gvidaj ribelantaj oficiroj kaj lasis pendigi ilin, dum kelkcent kunkonspirintoj estis senditaj al Siberio por deviga laboro. Ĉar la ribeluloj originis el la nobelaro, precipe renomaj familioj estis trafitaj de la ekzilado. De tiu ŝoko, kiu fariĝis lia traŭmato la timigita caro neniam plu liberiĝis. En la estiĝinta etoso de la malcerteco kaj de la malfido rilate al la nobelaro Nikolao fiksis kun armeeca malmildeco kaj reakcia maltoleremo firman taskon kun la celon forigi ĉiujn mankojn kaj misuzojn en la regno. La caro deziris esti persone informata „senescepte pri ĉiuj okazaĵoj“ kaj pri „suspektindaj kaj danĝeraj personoj“ en la regno. La t.n. Tria Sekcio, konstanta trupo de la polico sub la gvido de grafo Aleksandro Benckendorff, kiu estis ido de la prus-baltgermana nobelaro, ricevis specialajn kompetencojn por observadi kaj subaŭskultadi la homojn. Sed seriozajn reformojn, kiuj devis esti efektivigitaj jam de longe, la caro timis, tiel ke la enkondukitaj ŝanĝoj kaj modifoj restis grandparte senefikaj. Per dekreto oni malpermesis ankaŭ publike diskuti pri la servuteco, dum la kamparanoj dronis en la mizero. Kvankam manpleno da sekretaj carismaj komitatoj, konsilistoj, ministroj, fidinduloj kaj lojaluloj kiel V.P. Kočubej, M.M. Speranskij, P.D. Kiseljov aŭ S.S. Uvarov devis solvi la ekzistantajn problemojn, konkretaj rezultoj ne estis videblaj. Oni silente esperis, ke la problemoj, ankaŭ ekonomiaj, solviĝos de si mem. Detalojn pri la „priplendinda stato“ de la regno la imperiestro ofte eksciis nur el eksterlandaj informfontoj. Sub malfacilaj kondiĉoj kaj multaj homaj perdoj servutuloj konstruis la fervojan linion inter Peterburgo kaj Moskvo. En 1830 estis publikigita 15-voluma kolekto de leĝoj por kontribui al nova jura konscio. La pola ribelo de 1830/31, kiun antaŭis provo de atenco kontraŭ la frato de la caro, grandprinco Konstanteno, estis sufokita de la armeo. La antaŭe iom esperdona kleriga politiko estis severigita, dum la burokratio kaj korupto atingis novajn dimensiojn. Eĉ se la revoluciaj eventoj de la 1840aj jaroj lasis Ruslandon netuŝitaj, la ŝtataj organoj klopodis sufoki la spiritajn ĝermojn de pasintaj jaroj per redukto de la nombro de studentoj kaj de la universitataj rajtoj favore al armea edukado. La imperiestro ne plu faris diferencon inter realaj,

potencialaj kaj imageblaj danĝeroj, kaj la rimedoj de lia registaro alprenis groteskajn formojn. Laŭ peto de la aŭstra imperiestro, en majo 1849 la trupoj de Nikolao intervenis en la hungara ribelo kaj kondukis la hungaran armeon al malvenko. Kiam en decembro 1849 en Peterburgo 21 membroj de la Petraševskij-cirklo postulis la demokratiigon de Ruslando kaj la abolon de la servuteco en Ruslando, ili estis laŭŝajne ekzekutitaj kaj „pardonitaj“ per pli milda puno de multjara malliberigo en prizono aŭ labortendaro. Kiel konate, inter la kondamnitoj troviĝis ankaŭ la verkisto F.M. Dostoevskij. Sed ĉiuj tiuj rimedoj finfine evidentiĝis senutilaj. Per tiaj praktikoj oni nur provokis la novan inteligentularon, kiu estis dividita inter „slavemuloj“ (konservativuloj) kaj „okcidentemuloj“ (progresemuloj), kiu elformiĝis apud la revolucia movado. Al la inteligencio apartenis ne nur mondfamaj verkistoj kiel M.I. Lermontov, N.A. Nekrasov, N.V. Gogol’ kaj I.S. Turgenev. M.A. Korf, kunlaboranto de la caro por la cenzuro, opiniis, ke la imperio bezonas ne saĝajn sed obeemajn homojn. Per la slogano „ortodokseco, aŭtokrateco, popolismo“ la caristoj klopodis havigi al la regno plakatecan nacian ideologion kaj validigi, sub la gvido de kelkaj oficialaj historiistoj kiel N.M. Karamzin, S.M. Solov’ov kaj M.P. Pogodin, la gvidan rolon de la rusa ĉefnacio laŭ moderna adapto. Por pravigi la apartan vojon de Ruslando oni asertis, ke en Ruslando ĉio estas alia de la klimato ĝis la pensmaniero kaj biologio. La poeto F.I. Tjutčev opiniis pri la „rusa ideo“ (1848), ke la morala kaj kultura supereco de Ruslando levos ĝin post fazo de izoliteco sur novan nivelon de mondvasta agnosko. Kun skizofrenia fervoro oni kopiis de la pli evoluinta Okcidento la plej necesan teknologion por fari Ruslandon pli moderna. Sed tiel oni nur supraĵe enplantis okcidentajn semojn en la kulture dezertaj pejzaĝoj de Ruslando kun la vana espero, ke ili ĝermu. Ruslando daŭre restis subevoluinta lando. Tiel, Nikolao devis alfronti tutan vicon de opoziciaj tendencoj kaj kontraŭdiraj fenomenoj, al kiuj apartenis ankaŭ religiaj grupoj kiel la malnovritanoj kaj precipe la naciaj movadoj en Pollando, Ukrainio, ĉe la blankrusoj kaj en la Baltaj Provincoj. Al ĉiuj tiuj fluoj la caro reagis alergie kaj per kontraŭbatalaj kaj subpremaj rimedoj kaj per rusiga politiko.

En la ekstera politiko Nikolao, kiu ricevis la kromnomon „ĝendarmo de Eŭropo“, kontentiĝis pri la konservado de la aktuala stato, des pli ke la koncepto de la „Sankta Alianco“ inter Ruslando, Aŭstrujo, Prusujo kaj Francujo, kiu ekzistis de 1815, pli kaj pli paliĝis, dum en la sudo la „Orienta Demando“ aktualiĝis. Dum la ekonomio de la lando stagnadis, la grandega armeo de Ruslando forvoris gigantajn resursojn kaj kondukis al la trostreĉiĝo de la financoj. Pro la antaŭvidebla perdo de la ruslanda pretendo protekti la kristanojn de la Otomana Imperio Nikolao komencis sensencan militon kun Konstantinopolo, kiu riskis vastiĝi al monda milito kaj kiun la rusoj povis nur perdi en aŭgusto 1855. Sed en februaro de tiu ĉi jaro Nikolao subite forpasis meze dum la Krimea Milito. Epoko inter gloro kaj mizero ŝajnis esti finita, kaj al Aleksandro IIa, filo de Nikolao, restis konstrui pli „pacan, bonordan kaj feliĉan imperion“.



Rusaj caroj-imperiestroj Aleksandro Ia, Nikolao Ia, Aleksandro IIa, Aleksandro IIIa, Nikolao IIa

## Aleksandro IIa

Kiam Nikolao forpasis en 1855, Marko Zamenhof, patro de L.L. Zamenhof, estis nur 18-jara, ĉar li naskiĝis en 1837, kaj lia filo ankoraŭ ne vivis, ĉar li naskiĝos nur en 1859.

La junaĝa tempo de L.L. Zamenhof do trafis la eraon de imperiestro *Aleksandro Nikolaevič Romanov* (1818-81), kiu estis glorata de la liberalisma historiografio kiel la „liberiga“ caro, sub kiu en marto 1856 oni ĉesigis la Krimean Militon kaj enkondukis per politikaj kaj sociaj reformoj senekzemplan reformverkon, en kiu la dekreto de la 19a de februaro pri la abolo de la servuta sistemo 1861 estis la plej signifa. Samtempe kun la liberigo de la kamparanoj kaj la intencata socia renovigo de

Ruslando sekvis reformoj de la justico, klerigo, armeo, polico kaj en la agrikultura memadministrado (zemstvo). Aliaj dekretoj permesis al la dekabristoj (decembristoj) reveni el Siberio aŭ koncernis la komencon de la fervoja konstruado, la starigon de ŝtata banko kaj la malfermon de la Marijnski-teatro kaj de la Rubinŝtejn-konservatorio. La universitatoj ricevis ampleksan aŭtonomecon. En la 70aj jaroj aldoniĝis la enkonduko de la urba memadministrado kaj de la ĝenerala deviga armea servo. La tempo de la „Grandaj Reformoj" – idealigita de la liberalisma historiografio kiel heroa epoko kaj skeptike konsiderata de la nacikonservemaj historiistoj – estis periodo de forta konfuzado, kreskanta malorientiĝo kaj socia timo'. *Aleksandro IIa,* kiu estis spirite influita de poetoj kiel V.A. Žukovskij, kiu instruis al li specon de ,filozofio de la bono', sed ankaŭ de homoj kiel la historiisto K.A. Arsen'ev kaj de la jam menciita M.M. Speranskij, fariĝis prototipo de la ,bona monarko', kiu ne estis tiel aŭtoritatisma kaj reakcia kiel liaj antaŭuloj, kiu estis inteligenta, klasike erudicia kaj parolanta plurajn lingvojn. Ĉe lia kroniĝo en kaj ekster Ruslando estiĝis io kiel eŭforio: La nova caro proklamis aron da gravaj indulgaj aktoj kaj ĝeneralan amnestion por politikaj malliberuloj kaj malfortigis la cenzuron. En 1857 unuafoje ŝtata budĝeto estis publikigita. Nature, ankaŭ Aleksandro klarigis, ke li ne tuŝos la aŭtokratiisman sistemon kaj ke li mem intencas determini la publikan diskuton. Do, politikaj reformoj kiel la demokratiigo de la ŝtato kaj politiko devis atendi. La dramo de Aleksandro IIa rapide evidentiĝis. Ŝajnas, ke li konsentis pri reformoj multe pli pro la ĝenerala premo kaj la ŝanĝiĝanta publika opinio de tiu tempo ol pro persona konvinko aŭ deziro. Persone, li ankaŭ ne sciis kiel la liberiĝo kaj emancipiĝo de la kamparanoj estu efektivigitaj. Krom tio, baldaŭ montriĝis, ke escepte de la medioj de kleraj reprezentantoj de la liberalisma inteligencio kaj de malgranda grupo en la ŝtata aparato ĝenerale regis neniu entuziasmo liberigi la kamparanojn. Tiel, la progreso, kiun Ruslando tiom urĝe bezonis, estis haltigita fakte jam en la dua duono de la 60aj jaroj, ĉar la kontraŭstaro flanke de la konservativaj fortoj kontraŭ ili estis tro granda.

Tiu procezo estis akompanata de persona krizo, kiun la caro travivis kaj kiun influis la morto de la tronsukcedanto, atencoj, morganataj geedzecoj, pola ribelo. En aprilo 1866 iu D.V. Karakozov atencis en Peterburgo kontraŭ Aleksandro IIa, kion la monarko postvivis. Ĉi tiu plus dua atenco, kiu estis provita de la polo Berezewski dum la monda ekspozicio en Parizo, kiu forte impresis la ruslandan imperiestron, febligis liajn emojn pri reformoj kaj provokis reakciajn reagojn. La malnova cenzuro estis reekondukita kaj la polica kontrola sistemo estis fortigita.

La pafo de Vera Zasulič kontraŭ la peterburga urbestro D.F. Terpov en januaro 1878 akcelis la teroron flanke de la popolistoj („narodnikoj"), kiu estis danĝera socirevolucia movado. En februaro 1879 la Vintra Palaco estis skuita per forta eksplodo kun la celo mortigi la caron. Nova atenco kontraŭ la vivo de la caro mem sekvis en aprilo per la ago de A.K. Solov'ëv. Oni troviĝis en la epoko de la spronanta marksismo, en kiu famaj homoj kiel Karl Marx, Friedrich Engels, Georgij Pleĥanov, Vladimir Ul´janov (Lenin), Leo Trockij, Iosif Dĵugaŝvili (Stalin), Rosa Luxemburg kaj aliaj volis forigi la carismon kaj ŝanĝi Ruslandon kaj la mondon.

Koncerne la eksteran kaj militan politikon sub Aleksandro IIa, en lia epoko vastaj teritorioj estis konkeritaj en Centra Azio kaj Siberio kaj aligitaj al la Ruslanda Imperio. En Malproksima Oriento la urboj Blagoveščensk, Ĥabarovsk kaj Vladivostok estis fonditaj. La milita danĝero en Eŭropo daŭre ekzistis, ĉar la unuiĝo inter la Germana Regno kaj Aŭstrujo-Hungarujo de la 7a de oktobro 1879 devigis la partnerojn subteni unu la alian okaze de rusa atako per siaj tutaj armeoj. Per tiu unuiĝo Otto von Bismarck celis montri la izolitecon de Ruslando en la sistemo de la grandpotencoj kaj devigi ĝin realproksimiĝi al la Germana Regno. Jam en 1881 la duobla unuiĝo atingis sian celon, kaj Ruslando subskribis kun Germanujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo la trioblan unuiĝon, al kiu unu jaron poste aliĝis ankaŭ Italujo. En 1878 en San Stefano estis subskribita la pactraktato kun la Otomana Imperio, kaj la Berlina Kongreso konfirms la finon de la Rus-Turka Milito.

La vivo de imperiestro Aleksandro IIa, kiu estis simpatia sed senfeliĉa homo, inter konservativismo kaj liberalismo, inter konservado de la malnova sistemo kaj progresemaj reformoj, kiu certe trovis ankaŭ la admiron de la zamenhofa familio, fiaskis pro lia politika sinteno, kiu estis akceptita nek de ,dekstre' nek de ,maldekstre'. Je la kulmino de la spiralo de la perforto kontraŭ la carismo, kiu kaptis Ruslandon en la 80aj jaroj, la „nihilistoj", kiuj volis detrui la carismon, sukcesis mortigi la caron mem. Tio okazis la 1an (13an) de marto 1881 surstrate en Sankt Peterburgo. L.L. Zamenhof tiam havis 22 jarojn.

**Aleksandro IIIa**

Kun siaj liberalaj reformoj Aleksandro IIa postlasis grandan konfuzon kaj vakuon ĉe la elito, ĉe la posedantoj de bienoj kaj ĉe la kamparanoj, kaj la murdo de la imperiestro akrigis la krizon ĉe la Kortego, kiu devis esti rapide solvita. Apenaŭ preta kaj kapabla kaj eĉ ne antaŭvidita por la tronsukcedo, la nova caro *Aleksandro Aleksandrovič Romanov* (1845-94), filo de la murdito, eltenis la sorton laŭ sia maniero. Unue oni devis venĝi la murdon de la patro kaj sufoki la revolucian movadon, kiu estis senkompromise persekutata kaj fine disbatita kaj sufokita. La interna ordo devis esti restarigita, la liberalismo evitita, la prestiĝo de la dinastio kaj la aŭtokratio devis esti defendataj kaj renovigataj per ĉiuj rimedoj. Komence de aprilo la konspiristoj de la maldekstreme radikala unuiĝo „Narodnaja volja“ – Andrej Željabov, Sof'ja Perovskaja, Nikolaj Kibal'čič, Timofej Miĥajlov, Alexander Štromberg, Nikolaj Rogačëv kaj Nikolaj Rysakov – estis kondamnitaj al morto kaj pendigitaj. Hesja Hel'fman kaj Vera Figner, kiu estis arestita pli poste, ricevis dumvivajn arestpunojn en malliberejo. Al la organizaĵo apartenis la polaj fratoj Bronisław kaj Józef Piłsudski (1867-1935) same kiel Aleksandro Ul´janov, frato de Vladimir Il'ič Lenin. Ankaŭ Aleksandro havis la intencon mortigi la caron, sed en 1887 li povis esti arestita kaj estis kondamnita al morto, dum Piłsudski estis sendita al la siberia ekzilo.




La mortigo de caro Aleksandro Iia, 1a (13a) de marto 1881 en Sankt-Peterburgo



„Popolistoj“ kaj teroristoj: Zasulič, Figner, Hel´fman, Perovskaja, Željabov, Kibal´čič, Morozov

Du jarojn la nova caro atendis sian kroniĝon kaj li ankaŭ ne kuraĝis forlasi sian palacon en Gaĉino, ĉar li timis la teroristojn. La palacon en Carskoe Selo, kiu ligis lin kun malbonaj memoroj, li evitis. Finfine li akiris klarecon pri la irenda politika kurso. Kun la helpo de reakciaj ultrakonservativismaj kaj kontraŭ-reformismaj fortoj li intencis apliki malmolan politikon. Kiam li surtroniĝis, *Aleksandro IIIa*, kiu estis altstatura, kruda oficireca figuro, konfirmis en manifesto (de la 29a de aprilo 1881) la principojn de la „ortodokseco, aŭtokrateco kaj humileco“. En „Dekreto pri la interna ordo kaj publika trankvilo“ de aŭgusto li esprimis la nemiskompreneblan intencon, ke li subpremos ĉiuspecan opozician movadon en sia imperio kaj defendos la monarkion. Per tiu anonco fare de la nova caro, kies intencoj estis ankaŭ tuj senhezite efektivigitaj, la reĝimo samtempe fortigis la premon kontraŭ la ribelemaj naciaj kaj religiaj minoritatoj, precipe kontraŭ poloj, judoj, ukrainoj kaj kelkaj sektoj. Realpolitikistoj, monarkiistoj, konservativuloj kaj naciistoj diktis la tonon. En tio multaj elementoj de la politiko de Nikolao Ia estis revivigitaj, kiu servis kiel kulisa bildego dum la enscenigo de Aleksandro IIIa kiel nova imperiestro. Post la morto de la reformcaro, en la Kortego kaj en la lando la etoso rapide ŝanĝiĝis. Kun la helpo de

diversaj ekspertoj la nova caro Aleksandro IIIa klopodis puŝi siajn imagojn en la politiko, certe en la senco de lia mortinta patro, sed kun kelkaj korektoj, kiuj antaŭ ĉio devis haltigi liajn reformojn.

La gvidan rolon en la ŝtato de Aleksandro IIIa okupis precipe *Konstantin P. Pobedonoscev* (1827-1907), senatoro (1868), ŝtata konsilisto (1872) kaj de aprilo 1880 ĉefdirektoro de la Sankta Sinodo, funkcio kiu kongruis kun tiu de neeklezia ĉefo de la Rusa Ortodoksa Eklezio kun la rango de ministro. Sub tiu ĉi altranga kaj ege influa funkciulo, kiu fariĝis internacie fifame konata kiel ekstreme reakcia politika ideologo de la rusa konservativismo, la caristoj sentis sin kuraĝigitaj ankoraŭ pli forte kontraŭbatali ĉiujn suspektindajn, nedeziratajn, novismajn kaj politike nekonformajn tendencojn kompare kun pli fruaj tempoj. En tio Pobedonoscev estis firme apogata de verkistoj kiel M.N. Katkov kaj princo V.P. Meŝĉerskij. La ombra caro, kiel Pobedonoscev ankaŭ estis nomata, kiu elpaŝis kiel senkompromisa agresema predikisto kontraŭ la eŭropa liberalismo kaj konstituciismo kaj fone agadis per plej diversaj intrigoj, faris ĉion por liberigi sin de personoj, kiuj estis dorno en liaj okuloj. Eĉ tiom famaj verkistoj kiel Lev N. Tolstoj, kiu aŭdacis kritiki la eklezion el kristanisma vidpunkto, devis elteni la koleron de Pobedonoscev kaj la minacon esti ekskomunikita.[2] La tuta energio de la registara aparato estis investita en la konservadon de la laŭdiraj bazaj valoroj de la rusa ŝtateco: aŭtokrateco anstataŭ konstitucia ŝtato, imperiismo kaj naciismo anstataŭ federismo, konservativismo anstataŭ liberalismo, polica reĝimo kaj plena kontrolado anstataŭ reĝimo de la libereco de la opinio, subpremado anstataŭ burĝaj liberecoj, ideologia ortodoksismo anstataŭ libereco de la kredo, restaŭrado anstataŭ reformoj. Estas evidente, ke tia reakcia politiko ne plaĉis al la liberalismaj medioj en Okcidento, kun la rezulto, ke okazis reciproka distanciĝo inter Ruslando kaj Eŭropo. La edzino de Aleksandro, kiu estis dana princino, kiu ŝajne malŝatis la vivon de la Kortego, havis kontraŭ-germanan sintenon kaj ankaŭ en tiu rilato ĝuis la plenan fidon de la caro, kiu ja mem havis, kiel liaj antaŭuloj, germanan sangon. Post kiam ili spertis la malamon de la ‚kontraŭ-reformistoj', kiuj kontraŭstaris la enkondukon de konstitucio, la reformemaj ministroj (Loris-Melikov, Miljutin, Abaza, Gorĉakov, Ŝuvalov, k.a.) prezentis sian demision. La konstitucio estis konsiderata kiel io malbona, kaj oni ne hezitis atentigi pri laŭdire malbonaj spertoj en okcidenta Eŭropo kun konstitucioj. Por restarigi la mitan-mistikan unuiĝon inter la caro kaj la simpla popolo, N.P. Ignat'ev, ministro pri internaj aferoj, alia elstara figuro de la rusa naciismo kaj de la panslavismo, devis prezenti solvajn receptojn. Sed post kiam Ignat'ev perdis sian postenon, lin sekvis Dmitrij Tolstoj kiel nova ministro pri internaj aferoj. Tiu koterio de orgojlaj viroj, kiuj pli multe interesiĝis pri kortegaj intrigoj ol pri la bono de la ŝtato kaj popolo kaj kiuj ankaŭ reciproke mem apenaŭ eltenis unu la aliajn, altgrade influis la politikon de la carisma ŝtato. Sed pro manko de propraj politikaj programoj kaj konceptoj ili ne povis atingi pozitivajn rezultojn. En 1884 la universitata aŭtonomeco malaperis, tiel ke la profesoroj povis esti nomitaj rekte de la koncerna ministro. Tiel, tuta vico de kontraŭ-reformoj detruis la klopodojn de Aleksandro IIa (tamen la abolo de la servuteco ne estis tuŝita). Samtempe, sub Aleksandro IIIa la industriigo de Ruslando estis akcelata por venki la subevoluintecon de la lando. La nova industrio estis konstruita ankaŭ kun la intenco havi modernan infrastrukturon je dispono en kazo de nova milito. Lige kun la projekto realigi la Transsiberian Fervojon estas menciinda la nomo de S.J. Vitte, kiu kiel sukcesa entreprenisto en 1889 estis vokita al la nova registaro. Li fariĝis ministro pri financoj, dum N. Ĥr. Bunge fariĝis la arkitekto de la moderna rusa kapitalismo. Rilate la armeon, Aleksandro IIIa partoprenis kiel komandisto en la Rus-Turka Milito de 1877-78. La malnova (kaj vana) revo de la rusoj konkeri Konstinopolon kiel „historia misio" estis konservata por posedi kaj kontroli la Bosporon.

En Okcidento, Francio kaj la germanaj ŝtataro lanĉis sub la gvido de Prusio militon (1870-71). La militon antaŭis kverelo pri la sukcedo en Hispanio. Sekve okazis la fondo de la Germana Regno kaj la fino de la Dua Imperio de Napoleono IIIa. Germanio estis regata de Vilhelmo Ia (1871-88) kaj Vilhelmo IIa (1888-1918) kiel imperiestroj de la Germana Regno, en kiu Otto von Bismarck fariĝis ĝia unua kanceliero (1871-90). Kvankam en la interna politiko Aleksandro IIIa konis neniun kompaton, kaj la ekspansio de Ruslando en Centra Azio kaj Malproksima Oriento devis esti firmita, li strebis al pacaj rilatoj kun ĉiuj landoj de Eŭropo. Pro tio li estis nomata „caro de la paco" (ruse mirotvorec), ĉar en lia regadotempo ne okazis grava milito kun la grandpotencoj. La ekstera politiko de Ruslando estis formita de N.K. de Giers.

En oktobro 1888, dum vojaĝo kun sia familio en Kaŭkazon Aleksandro preskaŭ pereis en trajnakcidento ĉe Borki en orienta Ukrainujo, en kiu tamen 23 vojaĝantoj perdis si vivo, sed la caro mem

2 En 1881 aperis lia ‚Kritiko de la dogmisma religio' kaj en 1883 sekvis ‚Kio konsistigas mian kredon'. Kiel konate, Tolstoj solidariĝis kun L.L. Zamenhof kaj ties pacifisma instruo.

ne estis tuŝita. Nature, rapide cirkuladis onidiro pri atenco, sed oficiale tia versio estis neita. La surtera fino de la caro venis kelkajn jarojn poste. Aleksandro forpasis en oktobro (novembro) 1894 nur 49-jara en Livadija sur Krimeo pro rena malsano, kiu eventuale estis sekvo de la menciita trajnakcidento. L.L. Zamenhof tiam havis 35-jarojn.

La pritakso de Aleksandro IIIa kiel caro kaj personeco estis farita de diversaj flankoj laŭ diversaj konsideroj kaj konkludoj. Precipe la liberalisma okcidenta historiografio, kiu havigis al tiu caro la etikedon de „reakciulo“ kaj „kontraŭ-reformisto“, pritaksis lin negative, kompare kun Aleksandro Iia, kiu estis glorata kiel „granda reformisto“. Precipe en stalinismaj tempoj oni (ekzemple la svisa historiisto Valentin Gitermann en sia Historio de Ruslando, 1949, 3a vol., p. 272s.) faris ĉe li paralelon kun Ivan la Terura kaj Stalin mem. Lia konduto estis priskribita kiel plumpa kaj kruda, lia karaktero brutala, liaj taglibraj notoj banalaj kaj lia paroluzo similis al tiu de militisma feldmarŝalo. Kiel lernanto li estis tiel malkapabla, ke Pobedonoscev perdis la esperon pri li. De kelkaj samtempanoj (kiel S. Vitte) Aleksandro IIIa tamen estis karakterizita kiel sincera (aŭ honesta), bonkora kaj justa monarko. Oni emfazis trajtojn de pacamo, saĝeco kaj bonvolo, kiujn li reprezentis laŭdire. Samtempe oni karakterizis lin kiel iom ŝanceliĝeman kaj ne tro aktivan (aŭ laboreman) homon, kiu cetere havis alkoholan problemon. Precipe de la rusa naciisma kaj religia-eklezia flanko oni substrekis en iom naiva maniero liajn familiemon, pian religiecon kaj interesiĝon pri historio, arto, teatro kaj scienco (en 1888 estis malfermita la universitato de Tomsk kaj en 1892 inaŭgurita la Tret’jakov-galerio). Oni laŭdis lin ankaŭ pro tio, ke li akcelis la industrion de la lando (en 1891 estis komencita la konstruado de la Transsiberia Fervojo), kaj, kiel menciite, ke li ne gvidis militojn kun aliaj grandpotencoj. Per sia biografio de 2007, A.N. Bochanov klopodis doni al tiu imperiestro homan vizaĝon. Li asertis, ke Aleksandro IIIa estis serioza kiel homo kaj kiel politikisto. Plenan rehabilitadon Aleksandro IIIa kiel imperiestro de la paco, artoj kaj industriigo, kiu modernigis ankaŭ la armeon, ricevis en la tempo de la prezido de Vladimir Putin, dum la menciitan subpreman karakteron de lia regado (kiu pli sube en la ĉapitroj pri la poloj kaj judoj estos ankoraŭfoje prilumigita) oni evitas tro forte akcenti.



Gvidaj politikistoj de Ruslando: Pobedonoscev, Katkov, Ignat´ev, Bunge, Bunge, Vitte, Pleve (von Plehwe), Stolypin

**Nikolao IIa**

Ankaŭ la sekva - kaj plej lasta - caro *Nikolao Aleksandrovič Romanov* (1868-1918), filo de Aleksandro IIIa kaj rekta kuzo de la reĝo de Anglujo kaj de la imperiestro de Germanujo, lasis sin instrui de Konstantin P. Pobedonoscev (†1907), kiu estis ankaŭ elstara juristo. Kiel ultrakonservativa ideologo li rifuzis ĉiujn okcidentajn valorojn kaj idealojn de la libereco kaj sendependeco, kiujn li kondamnis kiel „nihilismajn kaj danĝerajn iluziojn“, ĉar li timis la disfalon de Ruslando, se tiuj valoroj venkos en tiu lando. Sub *Nikolao IIa* la ĝenerala ciniko en la politiko atingis novan kulminon. Politiko estis konsiderata kiel afero de la obeado, dum politike nekonformaj opinioj estis kondamnitaj, subpremataj kaj persekutataj kiel „pekaj eraroj“. Mistikaj religiaj influoj faris el Nikolao eksterodinare tragikan figuron, kiu sentis sin ligita kun sia popolo per naiva amo, kvankam li estis sisteme izolita de ĝi. Restinte infaneca tipo ĝis la aĝo de 19/20, Nikolao ŝatis la simplan mondon de ordonoj kaj obeado. Kiel lia antaŭulo, ankaŭ Nikolao IIa ne havis politikan programon, kiam li heredis la tronon, nek povis prezenti ian sperton kiel politikisto. Tiel, en la unuaj jaroj de sia regado li daŭrigis la politikon, kiun li heredis de sia patro, konservante ankaŭ la plej ĉefajn konsilistojn kaj ministrojn. Malbonan aŭguron signifis jena incidento, kiam en la antaŭa tago de la kroniga ceremonio iu tribuno disfalis kaj kaŭzis pli ol mil mortintojn. Supozeble la plej granda persona tragedio, kiu akompanis la familion Romanov en tiu tempo, estis la hemofilio de la filo kaj sukcedanto Alekseo, kiun li heredis de la avino, reĝino Viktorio de Anglio. Sed Nikolao devis okupiĝi ankaŭ pri amaso da aliaj problemoj, inter kiuj la industriigo, la krizo en la agrikulturo, la demokratiigo de la politiko kaj la enlandaj reformoj, la rilatoj kun Finnlando, la

sendependeco de Pollando kaj la milito kun Japanio, la Unua Mondmilito mem, laboristaj strikoj kaj la minaco de la prosperanta socialismo estis la plej fatalaj eventoj. La manifesto de la 18a de februaro 1905 liberigis novajn fortojn. La libereco de la gazetaro estis senprokraste utiligata de la opozicio por organizi kunvenojn kaj verki peticiojn, kiuj postulis konstitucian ŝtatan sistemon. En tiu nova ondo de revolucia movado vekiĝis ankaŭ la radikala inteligencio kaj la studentoj en la ĉefurboj kaj la etnaj minoritatoj en la gubernioj de la imperia rando. La teroro kaptis multajn politikistojn, kiuj estis mortigitaj en atencoj, kiel N.P. Bogolepov, ministro pri klerigo, D.S. Sipjagin kaj V.K. Pleve (von Plehwe), ministroj pri internaj aferoj, N.I. Bobrikov, ĝenerala guberniestro de Finnlando, grandprinco Sergej Aleksandrovič Romanov, k.a. Ankaŭ kontraŭ ĉefministro Pjotr Stolypin estis efektivigita grava atenco, sed li restis viva (sed en 1911 li mortis en atenco en Kievo). La fifama „Sanga Dimanĉo“ de Sankt-Peterburgo de la 9/22a de januaro 1905 kaŭzis sennombrajn viktimojn. La 17an de oktobro 1905 sekvis nova manifesto, kiu proklamis burĝajn liberecojn kaj elektitan parlamenton kun leĝdonaj kompetencoj kaj promesis nerekte ankaŭ la egalan pozicion por religioj kaj etnaj minoritatoj. Inter 1906 kaj 1917 la Dumao, la parlamento de Ruslando, estis kvarfoje kunvokita. Malgraŭ tio, tiuj rimedoj ne trankviligis la ekscititan situacion en la lando. Sporadaj pogromoj kontraŭ judoj kaj inteligentuloj eksplodis en la okcidentaj regionoj de la imperio, kiujn la caro interpretis kiel „sanajn reagojn de la popolamaso kontraŭ la revolucio“. Armita ribelo, kiu eksplodis en decembro 1905 en Moskvo, estis sufokita. Sur politika ebeno la antagonismaj fortoj manovriĝis al pato. Neniu partio sukcesis trapuŝi ŝanĝon de la sistemo kontraŭ la volo de la aliaj partioj. Aliflanke, la scienco, literaturo kaj arto komencis reprosperi, dum la cara familio izoliĝis sub la fatala infuo de la ĉarlatano Grigorij Rasputin. Ĉi tiu obskura miraklo-predikanto, kiu eĉ sukcesis ŝajne haltigi la hemofilion de la sukcedanto Alekseo, plene kontrolis la carinon Aleksandra, tiel ke Rasputin fariĝis eĉ diskutita temo en la Dumao. Por ne pli forte diskrediti la reputacion de la monarkio, kiu troviĝis en agonia stato, Rasputin finfine estis perforte likvidita en decembro 1916. Malgraŭ kelkaj armeaj sukcesoj de la rusoj dum la Unua Mondmilito, en kiu Ruslando devis priplori verŝajne inter kvar kaj kvin milionojn da viktimoj, inkluzive mortintojn, vunditojn kaj militkaptitojn, soldatojn kaj civilulojn, la carismo finiĝis en februaro 1917: La 15an de marto 1917 la caro devis abdiki. Provizora Registaro transprenis la regadon de Ruslando. La 25an de oktobro (7a de novembro) 1917 la bolŝevikoj de Lenin puĉis kontraŭ tiu registaro kadre de la „Granda Socialisma Oktobra Revolucio“ kaj transprenis la povon en la ŝtato. En aprilo 1918 la cara familio estis murdita de la bolŝevikoj. Sub la bolŝevikoj, kiuj perforte enkondukis la socialisman reĝimon en Ruslandon, sekvis nepriskribebla teroro, kiu kondukis al intercivitana milito, kiu daŭris kelkajn jarojn kaj kaŭzis milionojn da mortintoj.




Dostoevskij, Tolstoj, Rasputin, caro Nikolao IIa, Lenin, Stalin, Trockij

## Pollando kaj la „pola demando“

En la 17a kaj 18a jarcentoj Pollando travivis fazojn de militoj kun siaj najbaroj. La malvenkoj kaj detruoj same kiel la interna politika anarkio kondukis la landon al la rando de la ruiniĝo, tiel ke reformoj fariĝis neeviteblaj. La 3an de majo 1791 la reformema Sejmo akceptis novan konstitucion, kiu estis konsiderata kiel moderna, ĉar ĝi baziĝis sur la ideoj de la franca klerismo. Unuafoje difiniĝis la pola ŝtato kaj la pola nacio, dum la „sankta romkatolika kredo“ estis proklamita kiel „nacia religio“, ne sen garantii la religian liberecon por aliaj konfesioj. La konstitucio adoris la ideon de la popola suvereneco kaj antaŭvidis la dividon de la potencoj. Tamen, la nobelaro konservis sian statuson kiel signifa klaso, kies sinkompreno estis larĝigita je la riĉa burĝaro. La najbaraj potencoj de Pollando vidis en tiu konstitucio, kies celo estis aboli la malmodernan mezepokan ŝtaton, provokon kaj danĝeron por la absolutisma

regadoformo. Ili deklaris ĝin malvalida kaj komencis, sen konsulti la kontraŭ-reformismajn polajn magnatojn, kiuj konsideris sian pozicion malfortigita, rekte enmiksiĝi en internajn polajn aferojn. Sekve, tiuj potencoj, t.e. Ruslando, Aŭstrujo kaj Prusujo, disdividis en la jaroj 1772, 1793 kaj 1795 la teritorion de la pol-litova reĝlando inter si, aneksis kaj malaperigis ĝin de la eŭropa mapo. Ruslando ricevis 62% de la lando kun 45% de la loĝantaro, Pruslando ricevis 20% de la teritorio kun 23% de la loĝantaro kaj Aŭstrujo akiris 18% de Pollando kun 32% de ĝiaj loĝantoj. Sub la gvido de ***Tadeusz Kościuszko*** (1746-1817) en marto 1794 en Krakovo eksplodis ribelo, kiu estis apogita de multaj kamparanoj. Kvankam la poloj sukcesis venki la rusajn trupojn ĉe Racławice, en Varsovio kaj Vilno okazis popolribeloj, kiuj estis influitaj de jakobenoj. Sed en aŭtuno la poloj travivis ĉe Maciejowice gravan malvenkon. En januaro 1795 ***Stanisław Aŭgust Poniatowski*** (1732-98) abdikis kiel plej lasta reĝo de Pollando, kaj du jarojn poste la nomo ‚Pollando' entute malaperis de la uzado. Oni parolis pri krucumado de Pollando, eĉ pri la fino de Pollando entute. Dum aliaj popoloj de la regiono forĝis siajn naciojn, por la venontaj 123 jaroj „Pollando" restis nura ideo, kiu estis reduktita al la kulturo, literaturo kaj religio, do ne pli ol memorindaĵo el la pasinteco aŭ espero por la estonteco, fakte nacio sen ŝtato. La nobelaro komencis perdi sian iaman signifon. En la ruslanda parto la malnova socia kaj politika strukturo dum restis konservata.




Divido de Pollando-Litovujo en 1772-1795 (supre), Varsovia Duklando (1807-15) kaj „Kongresa Pollando" ekde 1815 (sube). (Fonto: Mapoj el Vikipedio)

La hotelo Lambert en Parizo fariĝis la centro de la pola emigracio, la ligoj kun Francio estis fortigitaj, kaj estis proponitaj diversaj konceptoj por venki la dividon. Sed la konservemaj monarkioj ne ŝatis la

freŝajn politikajn ideojn, kiuj venis el Francio. La plej sensacia decido kadre de la franc-pola alianco estis la tasko, kiun Napoleono donis al la poloj: starigi polan legion en norda Italio, kiu ampleksis en 1797 ses mil soldatojn kaj konsistis precipe el polaj militkaptitoj kaj dizertiĝintoj de la aŭstra armeo. El tiu tempo originas la pola nacia himno, kiu komenciĝas per la vortoj ‚Pollando ankoraŭ ne estas perdita'. Ĉie, eĉ en Karibio, la pola legio estis utiligita por defendi Napoleonon, dum Pollandon mem ĝi neniam atingis. Tie, ***Adam Jerzy Czartoryski*** (1770-1861), la „ostaĝo" de imperiesto *Aleksandro Ia* (1801-25), vane klopodis por restarigi Pollandon en persona unuiĝo kun la cara familio. Kiam en 1806 Francujo proklamis la militon al Prusujo, Pollando fariĝis politike interesa por Napoleono. En la Pactraktato de Tilsito de 1807 Napoleono kaj Aleksandro interkonsentis fondi, en la prusa parto de Pollando, „Varsovian Duklandon".[3] La ŝtatestro de tiu konstitucia monarkio estis duko *Frederiko Aŭgusto Ia de Saksujo*. Ĝiaj kvar sinsekvaj ĉefministroj estis poloj kaj nomiĝis Stanisław Małachowski, Ludwik Szymon Gutakowski, Józef Poniatowski kaj Stanisław Kostka Potocki. En la interno de tiu anakroniisma satelita bufra ŝtato diversaj nacipolaj cirkloj kaj fortoj influis la politikon. Kvankam la katolikismo estis agnoskita kiel ŝtata religio, la konstitucio garantiis al ĉiuj civitanoj la liberecon de la kredo kaj la egaleon antaŭ la leĝo. La atakon de la jaro 1812 kontraŭ Ruslando Napoleono nomis „Pola Milito". 100'000-150'000 poloj batalis flanke de la Granda Armeo. Eĉ la historia limo de Pollando kaj Litovujo estis provizore restarigita. Post la retiriĝo de Napoleono en vintro 1812/13 rusaj trupoj invadis Varsovion kaj tuta Pollando estis okupata de la rusoj. Poniatowski pereis en oktobro 1813 en la Popola Batalo ĉe Lepsiko. La Varsovia Duklando, konsistanta el la ses depertamentoj Poznań, Bydgoszcz, Kalisz, Varsovio, Płock kaj Łomża kun teritorio de entute 155'000 km² kaj 4,3 milionoj da enloĝantoj, estis rigore administrata laŭ la franca modelo kaj ekzistis ankoraŭ ĝis la 30a de majo 1814. Okaze de la Viena Kongreso de 1814/15, kiu redesegnis la limojn de Eŭropo kaj en kiu la „pola demando" fariĝis unu el la ĉefaj temoj de la tagordo, la dividoj de Pollando-Litovujo estis solene konfirmitaj. Kontraŭ la volo de Aŭstrujo (Metternich estis unu el la gvidaj politikistoj) kaj Anglujo, caro Aleksandro Ia volis unuigi Pollandon kun la Ruslanda Imperio. La Varsovia Duklando estis likvidita kaj la geografia mapo estis redesegnita. Kvazaŭ en nova disdivido de Pollando, apud ia nove kreita „Poznana Grandduklando"[4] (ekzistanta ĝis 1848) kaj ia „Reĝlando de Galicio kaj Lodomerio"[5] estiĝis sur la teritorio, kiun Aleksandro okupis de 1812, la pola restŝtato en formo de „Pola Reĝlando", populare nomata ankaŭ „Kongresa Pollando", kun Varsovio kiel centro.[6] Tiu nova pseŭdoŝtato ampleksis surfacon de 126'955 km² kaj konsistis el dek gubernioj: Varsovio, Kielce, Radom, Kalisz, Płock, Siedlce, Piotrków, Łomża, Suwałki kaj Lublin kaj havis 4,032 milionojn da enloĝantoj en 1827 kaj 4,696 mil. en 1856. 75% estis poloj, 14-15% judoj, la resto germanoj, ukrainoj, rusoj, litovoj, blankrusoj, k.a.

Kvankam tiu pola reĝlando havis propran konstitucion, kiu estis verkita laŭ franca modelo sed trudita de la ruslanda caro, ĝi estis unuigita kun la Cara Imperio per persona unio, t.e. la rusa caro estis samtempe la reĝo de Pollando. En la pola reĝlando la pola lingvo estis sola administra lingvo. La signifa influo de la pola aŭ poligita supera tavolo restis konservita, sur loka nivelo ankaŭ la jura sistemo, la ekonomia kaj sociala sistemoj de la pola respubliko kajla forta pozicio de la katolika eklezio kaj la pola kleriga sistemo. En la ekstera politiko, la ŝajnstato estis reprezentata de la Ruslanda Regno. Pinte de la reĝlando troviĝis vicreĝo, kiu funkciis kiel guberniestro, kiu en principo devis esti polo. Krom tio, ekzistis ŝtata kaj administra konsilioj, kiuj decidis pri la ministerioj. Ankaŭ la membroj de la registaro devis esti poloj. La reĝlando eĉ ricevis propran armeon, kiu estis komandita de rusoj. La efektiva reganto en Varsovio estis la persona anstataŭanto de la caro. Sed jam en 1836 la ofico de la vicreĝo ne plu estis disdonita, kaj Konstanteno, la frato de la caro, neoficiale plenumis ĝin. Sub la kuratoreco de N.N. Novosil'cov liberalismaj tendencoj estis subpremataj, ĉar baldaŭ evidentiĝis, ke liberalismaj polaj imagoj pri pli da ŝtata sendependeco kunpuŝiĝis kun ruslandaj interesoj, tiel ke en la dua Sejmo formiĝis opozicio kontraŭ la carisma reĝimo. Sub tiaj kondiĉoj, pluraj generacioj de poloj faris la amaran sperton de fremda regado kaj politika subpremado.

Koncerne la aliajn polajn teritoriojn, Krakovo estis starigita kiel „Libera Urbo" (ĝis 1846), kaj la regionoj ĉirkaŭ Vilno, Vitebsk, Brest, Bjalistoko kaj Minsko aldoniĝis kiel „okcidentaj gubernioj" rekte al la Ruslanda Imperio mem.

---

[3] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Herzogtum_Warschau.
[4] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Grand_Duchy_of_Posen.
[5] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Galizien
[6] S. https://de.wikipedia.org/wiki/Königreich_Polen kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Kongresspolen.

Post la morto de imperiestro Aleksandro (1824) kaj sub lia sukcedanto *Nikolao Ia* (1825-55), kiu profiliĝis kiel ekstreme aŭtokratisma reganto, kiu estis ankaŭ nomata „Nebukadnedzaro de la nordo“, alvenis la fino por liberalismaj eksperimentoj. Pro la rilatoj de liaj polaj subuloj kun ruslandaj opoziciuloj, Nikolao suspektis ilin. Post la dekabrista (decembrista) ribelo de 1825 kelkaj adeptoj fuĝis al Pollando, kie ili trafis la simpation de la homoj. La nova reganto postulis de la pola justico, ke ĝi severe punu tiujn ribelulojn kaj reagis per amasaj arestoj kaj punagadoj, ignorante la principojn de la pola konstitucio. La patriotisma poeto ***Adam Mickiewicz*** (1798-1855) estis ekzilita al Ruslando.

En 1830 la krizo atingis novan kulminon. En novembro grupo de konspirantoj de la Varsovia Armea Akademio provis mortigi grandprincon Konstanteno. La plano fiaskis kaj Konstanteno forlasis kun siaj trupoj Varsovion. La kulpuloj ricevis drastajn punojn. Okaze de alvoko batali en januaro 1831 la poloj mezuris siajn fortojn kun la Ruslanda Imperio. Nikolao uzis la pretekston por invadi Pollandon kun armeo de 120’000 soldatoj kontraŭ 85’000 malbone armitaj poloj. Post kelkaj venkoj la poloj tamen malgajnis la batalon ĉe Ostrołęka. Sub la gvido de general-feldmarŝalo princo I.F. Paskevič-Erivanskij la caristoj decidis brutale reagi. La pola konstitucio estis anstataŭigita per t.n. „Organa Statuto“ (februaro 1832), kiu nuligis de facto la specialan statuson de la pola reĝlando, kiun la caro baldaŭ komencis ignori. Due, la Sejmo kaj la memstara pola armeo estis abolitaj kaj la daŭra milita stato estis enkondukita (kaj restis ĝis 1856). Krom tio, 45’000 familioj de la malalta nobelaro estis deportitaj en forajn regionojn de Ruslando. Forta rusa okupacia potenco zorgis por tio, ke ĉiuj liberalaj kaj naciaj tendencoj kaj movoj estu subpremataj kaj sufokataj. Radikalaj rusaj grupoj vidis alveni sian momenton por puŝi la radikalan naciismon, kiu estis ‚oficiale’ aŭ ŝtate ordonita de Nikolao Ia. En 1832 la pola valuto (zloto) estis anstataŭigita per la rusa rublo, en 1837 la vojevodioj estis transformitaj al gubernioj, post 1839 la eduka sistemo de Pollando estis administrata rekte de Sankt-Peterburgo, kaj ĉiuj gravaj postenoj kaj oficoj estis okupataj de rusoj, kaj en 1847 la lando estis submetita al la rusa punjuro. Ĉiujn decidojn prenis la caro mem, kiu minacis, ke li detruos Varsovion, se la nacirevolucia movado revigliĝos. Rimedoj kiel la ŝanĝo de la nomoj de la okcidentaj gubernioj al „Nordokcidenta Lando“ kaj la malpermeso de la pola lingvo kiel lingvo en la lernejoj kaj tribunaloj celis sekurigi la sukceson de la rusiga politiko. Ankaŭ novaj doganaj limoj inter la pola reĝlando kaj Ruslando estis enkondukitaj. La ĉefepiskopo de Varsovio perdis la titolon de primaso, dum la instalado de rusortodoksa episkopejo devis forpuŝi la katolikismon. Malgraŭ la intenco de la caro fari al la poloj kelkajn cedojn, ili restis suspektemaj kaj ne fariĝis pli lojalaj rilate al la rusa ŝtatpotenco, kun kiu ili ne volis ligiĝi. La provo integri la polan ŝlaĥton, kies influo malfortiĝis, en la socian sistemon de Ruslando, estis malfacila kaj pena. La ribelo de 1830/31 do fariĝis turnopunkto por la plua sorto de la ŝlaĥto kaj la pola nacio ĝenerale. Nikolao nomis la polan nobelaron „vagadanta friponaro“ kaj konsideris ĝin la plej danĝera kaj putra klaso entute. Per dekreto de oktobro 1831 parto de la ŝlaĥto perdis la nobelan statuson, dekono de la grandposedo de la pola nobelaro estis konfiskita, kaj novaj kategorioj estis formitaj, kvankam la privilegioj kaj la terposedo de la pola nobelaro daŭre estis agnoskitaj de la caro. Ankoraŭ en la 70aj kaj 80aj jaroj la pola nacio estis reprezentata de 14 grandaj magnataj familioj (kiel Potocki, Radziwiłł, Pusłowski, Tyszkiewicz, k.a.), kiuj posedis unu kvaronon de la tero de Pollando. Sed la klopodoj de la caristoj fariĝis evidentaj, kiuj celis pli kaj pli redukti la rajtojn de la poloj, kiuj sopiris restarigi la propran malnovan sistemon, per burokratiaj, impostaj kaj ekonomiaj rimedoj. Sed malgraŭ ĉiuj kontraŭ-polaj ĉikantoj la aŭtokratio ne sukcesis limigi la ŝlaĥton, kaj la plano loĝigi rusojn en la okcidentaj regionoj fiaskis, tiel ke la poloj parte devis esti rehabilititaj. La posteuloj de tiuj nobeloj, kiuj estis integritaj en la nobelaron de la Ruslanda Imperio, sukcesis konservi sian gvidan ekonomian rolon kaj la kulturan kaj religian aŭtonomecon en la okcidentaj gubernioj, al kiuj apartenis ankaŭ Grodno kaj Bjalistoko.

La rusaj reprezalioj kontraŭ Pollando kaŭzis ondon de elmigrado de 50’000 poloj, kiuj fuĝis sur prusan teritorion, kie la poloj estis varme bonvenigitaj de la liberalaj germanoj kaj estis morale subtenataj. Eĉ Richard Wagner kunkantis en la ĥoro de la germana entuziasmo pri la ribelemaj kaj liberemaj poloj, pro kio en 1836 li verkis la uverturon ‚Polonia’.[7] Sed en la 1840aj jaroj la germana entuziasmo pri la poloj malfortiĝis. La plimulto de la fuĝintaj poloj profitis amnestion de la caro kaj revenis en Kongresan Polujon, dum ĉirkaŭ dek mil poloj tamen preferis migri al Francujo kaj aliaj landoj, kie la agado en la ekzilo estis fortigita.

En 1846 okazis pola ribelo en Galicio. Post tio Krakovo perdis sian aŭtonoman statuson kaj estis aligita kiel plej lasta memstara pola ento al la aŭstra provinco „Galicio kaj Lodomerio“. Dum la germana revolucio kaj la „printempo de la popoloj“ de la jaro 1848 la revolucia fajrero saltis ankaŭ al Poznano.

[7] Aŭskultu ĝin sub https://www.youtube.com/watch?v=SncAaTg0OKo.

Kiam la plano tranĉi la duklandon en germana kaj pola teritorio fariĝis konata, la poloj kontraŭstaris ĝin. Poznano estis integrita en la Germanan Union (ĝis 1851), kaj la nomo de la regiono fariĝis „Provinco Posen“.[8]

Post la morto de Nikolao Ia en 1855 en Kongresa Pollando vekiĝis la espero, ke oni povos atingi pliboniĝon de la politika, nacia kaj socia situacioj ankaŭ sen ekstera helpo. Sed ankaŭ la pli milda reĝimo de la nova caro *Aleksandro IIa* (1855-81) konsilis al la poloj forgesi ĉiujn romantikajn revojn pri ŝtata sendependeco. En 1856 la milita stato estis nuligita en la pola reĝlando kaj sennombraj ribeluloj de 1831 estis liberigitaj kadre de cara amnestio. Sub grafo ***Andrzej Zamoyski*** (1800-74) estis revivigataj la planoj por rus-pola kunlaboro kun politiko de malgrandaj paŝoj, kiuj iam estis ellaboritaj de Czartoryski. Sed tiu procezo ne vere utilis al la intencoj de la caro kaj sur la pola flanko eĉ pli fortigis la naciajn kaj „demokratiajn“ fortojn. Ĉi-foje estis ĉefe studentoj el la senposedigita nobelaro, la malalta oficistaro kaj la varsovia urba civitanaro, kiuj havis konspirajn celojn. Organizadnte amasajn manifestaciojn kaj ekleziajn festojn aŭ naciajn memortagojn, ili serĉis la konflikton kun la okupacia potenco kaj akcelis la kontraŭ-rusan etoson en la popolo.

Kiam la 27an de februaro 1861 dum la disbatado de manifestacio estis mortpafitaj kvin homoj per la kugloj de „kozakoj“, Aleksandro komprenis la seriozecon de la situacio kaj montris sin preta fari cedojn al la poloj. Li promesis restarigi la polan aŭtonomecon paŝon post paŝo, la repolonigon de la administracio kaj kelkajn ŝanĝojn, kiuj koncernas la personaron. Kvankam sur tiuj kampoj okazis kelkaj progresoj, en aprilo okazis perforta dissolvado de plia manifestacio kun cent mortintoj. Kiam en aŭtuno 1861 la ribelemo denove ŝvelis, la carisma reĝimo povis helpi sin sole per la proklamo de la milita stato kaj per amasaj arestoj. La preĝejoj estis fermitaj. Ĉar ĉi-foje en la ribelo partoprenis ankaŭ la ekleziularo, la judoj kaj la protestantoj, la situacio komplikiĝis kaj la pola ribelo fariĝis aktuala temo, kiu estis diskutata eĉ sur eŭropa politika nivelo.



Ĉefaj gvidantoj de la ´romantika´ pola naciliberiga movado en la 19a jarcento: Kościuszko, Poniatowski, Czartoryski, Mickiewicz, Zamoyski, Wielopolski

***Aleksander Wielopolski*** (1803-77), gvidanto de la registaro de Kongresa Pollando, fiaskis kun sia por-rusa politiko, kiun li aplikis por regajni la perditan polan aŭtonomecon. Nova ĉefo de la reĝlando fariĝis grandprinco Konstantin Nikolaevič. Nun 25’000 apenaŭ trejnitaj kaj nur malbone ekipitaj ribeluloj preparis sin por batali en printempo 1863 (L.L. Zamenhof tiam estis 4-jara). Sed pro la manko de armiloj kaj la malkapablo de la armea gvidantaro tiuj planoj ŝanceliĝis. Sub la impreso de la solidareco de la eŭropa publiko la ribeloj en la polaj kaj litovaj landoj eĉ vastiĝis. Sed la kunlaboro inter Ruslando kaj Prusujo malhelpis la eksteran helpon. La caro perdis la paciencon, suspendis Wielopolski kaj eksigis grandprincon Konstanteno, kiu estis anstataŭigita per grafo Fjodor Berg. Nur post 15-monata etmilito Ruslando povis ĉesigi la polan ribelon en aprilo 1864. La reago de la carisma reĝimo estis malmola. La nobelaro, inteligencio kaj ekleziularo estis kruele venĝitaj. Post la sufokado de la ribelo centoj da mortkondamnoj estis esprimitaj kaj ekzekutitaj kaj miloj da homoj estis deportitaj en la internon de Ruslando aŭ al Siberio. Pli ol la duono de la katolikaj monaĥejoj en Litovio estis fermitaj, kie la ĝenerala guberniestro de la nordokcidentaj regionoj, M.N. Muravjov (1863-5), ricevis la kromnomon „pendigisto de Vilno“. La rusa politiko rilate al Pollando estis simbola por la rusa naciisma politiko entute, kiu influos la diskutojn en la interna kaj ekstera politiko ankaŭ en la venonta tempo. La ruslanda publiko,

[8] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Provinz_Posen.

kiu komence ankoraŭ apogis la mildan reformkurson de Aleksandro IIa en Pollando, nun ŝanĝis la opinion post la ribelo kaj ĝenerale subtenis pli radikalan kurson de la rusa registaro en tiu lando.

En 1867 en Parizo iu pola naciisto (Anton Berezewski) provis mortigi Aleksandron IIan. La traŭmatan sperton pri la poloj la caro memoris kun hororo. Mencii la nomon de Varsovio sulkigas la frunton kaj la buŝo konvulsias sub la lipharoj – tiel la caro estis citita de samtempanoj pri lia sinteno al la poloj.

La plej imagebla koŝmaro baldaŭ alvenis. Gravan baton la cara imperio ricevis pro la murdo de Aleksandro IIa je la 1a (13a) de marto 1881 en Sankt-Peterburgo. La atencinto nomiĝis Ignat(ij) Grinewitzky kaj devenis de la pola nobelaro. La posteulo *Aleksandro IIIa* (1881-94) reagis kruele kaj lasis kondamni la murdistojn de sia patro al la morto kaj pendigi ilin. Konstantin P. Pobedonoscev, kiu tiam estis, kiel supre prezentite, la ĉefa influo figuro en la carisma ŝtato, timata kaj malŝatata kiel „maljuna vampiro“, draste akrigis la persekutadon de ĉiuj opoziciaj fortoj kaj lasis subpremadi ĉiujn iliajn demokratiajn, naciajn kaj konstituciajn postulojn. Ju pli vigle la poloj ribelis kontraŭ la carismo, des pli konsekvenca fariĝis la kontraŭpremo flanke de la rusiga politiko, kiu direktis sin en la tuta regno kontraŭ ĉiuj malkonvenaj kaj malobemaj etnaj kaj religiaj minoritatoj. Dum la katolika eklezio kaj la luterismaj germanoj de Baltio alfrontis senteblajn reprezaliojn, la rusa ortodoksio ricevis novan puŝon antaŭen. En Varsovio la rusoj konstruis ortodoksan katedralon por akcenti la pretendon de la carismo (en 1919 ĝi estis malkonstruita). La guberniestro de Varsovio, Fjodor Berg, kiu estis rusigita baltia germano, restarigis la ordon inter 1863 kaj 1874. Kvankam la Napoleona Kodo restis valida, la polaj oficistoj estis anstataŭigitaj per rusoj. La Pola Banko (Bank Polski) fariĝis filio de la imperiestra banko. Ekde 1865 nur la rusa lingvo estis permesata kiel sola lingvo en la administracio kaj lernejoj, dum la pola lingvo povis esti konservata kiel lingvo en la religia instruado. La varsovia universitato estis rusigita, religiaj festoj kaj procesioj estis malpermesataj. Samtempe, la doganaj limigoj estis nuligitaj, kaj je la 2a de marto 1864 en Pollando estis proklamita la liberigo de la kamparanoj probable kun la intenco krei kontraŭdirojn kaj kverelojn inter la polaj kamparanoj kaj la pola nobelaro por entute malfortigi la polan nacion.
Tiel, la pola reĝlando pli kaj pli perdis sian apartan statuson, fariĝis egalŝaltata kun la rusaj kondiĉoj kaj reguloj. Ĝi estis degradita al la t.n. „Vistula lando“, kiel la caristoj oficiale nomis Pollandon ekde 1867. Al la teritorio de la iama litova grandprinclando la ruslandaj oficistoj donis la titolon „okcidentrusaj regionoj“. Plej malfrue en 1874, kiam la ofico de la vicreĝo estis anstataŭigita per la ofico de la ĝenerala guberniestro, la pola aŭtonomeco estis praktike abolita kaj forigita.

Nature, la seniluziiĝo de la poloj pri la malokazinta helpo el Okcidento estis grandega. Rilate al Pollando Napoleono IIIa montris sin maldigna kaj Bismarck traktis la polojn per arogaj vortoj. Ĉiuj esperoj restarigi la polan ŝtatecon per okcidenta helpo do elvaporiĝis. Post tiu malvenko inter poloj disvastiĝis pli realisma sinteno anstataŭ romantika naciismo kun la konscio, ke oni unue devas rilati al la disdividaj potencoj per certa lojaleco, antaŭ ol la celo de la liberiĝo kaj reunuiĝo de la unuopaj polaj teritorioj povas esti atingita. Kelkaj polaj cirkloj kiel la „varsoviaj pozitivistoj“ komprenis, ke estas sensence apliki pli da perforto. Oni komencis reprezenti la opinion, ke Pollando ne estas sufiĉe evoluinta aŭ matura por elteni propran ŝtaton. Post la romantika ludo per la rimedoj de la konspirado kaj kontraŭstarado, do la ludo kun la fajro kaj la diabla cirklo de la ribelado kaj subpremado, oni komencis varbi por la „organisma laboro“, kiu antaŭvidis kompromison inter la antagonismaj tendaroj de la popolo kaj reĝimo. En tio oni pli vaste aplikis la nocion de la nacio al ĉiuj popoltavoloj, ĉar oni opiniis, ke la gepatra lingvo estas unuavice decida por la nacia aparteneco. Do, la fortigo de la lingvo kontraŭ la asimilado fariĝis ĉefa elemento de la nacia batalo. Sed la aktuala reĝimo en la unuopaj partoj de Pollando daŭre klopodis fari el poloj rusojn aŭ germanojn, aplikante rusigajn kaj germanigajn rimedojn por elsarki la polan identecon. Grava kaj ĝena problemo por la poloj estis la kreskanta emancipiĝo de ukrainoj, litovoj kaj blankrusoj, kiuj anoncis proprajn naciismajn pretendojn, pridubante la ekziston de la ‚historia Pollando'. Ankaŭ la judoj havis proprajn ideojn kie ili povus solvi sian „demandon“. Ĉiuj tiuj inter si rivalantaj etnoj egoisme agis por propraj ekzistorajtoj kaj avantaĝoj kaj rilatis same malamike al la poloj kiel al la carismaj aŭtoritatoj mem.

Kvankam la malnova pola nobelaro daŭre sentis sin supera rilate al ĉiuj aliaj etnaj kaj sociaj tavoloj, ĝia malvenko kontrastis kun la socia kaj ekonomia progreso de la poloj. Post la forigo de la doganaj limoj polaj produktoj povis esti libere eksportataj en la gigantan ruslandan merkaton, kaj la nova memkonscia pola burĝaro, kiu malrespektis la malnovan polan nobelaron, scipovis eltiri profiton el tiu situacio. Sed la ekonomia prospero ne anstataŭis la koleron de la poloj kontraŭ la ĉeesto de giganta fremda okupacia armeo, kiu praktikis la tiranion de pedantaj oficistoj kaj la cinikan malamikecon

kontraŭ la poloj. Dum ne sensignifa nombro de polaj akademiuloj kaj teknikistoj ludis ne malgravan rolon en tiu ruslanda kadro, kiu ofertis multajn eblecojn por ekonomia kaj socia agado, la granda popolamaso restis skeptika pri la laŭdira bonvolo de la caro.

Sub tiaj kondiĉoj okazis pli kaj pli profundaj sociaj ŝanĝoj, kiuj estis komplikitaj per la antagonismaj ekonomiaj kaj demografiaj evoluoj. Unuflanke ekzistis nova laborista klaso, kiu kontrastis kun la mizeriĝinta kamparanaro, aliflanke nova tavolo de inteligentuloj rivalis kun ŝvelinta armeo de oficistoj. Dum la naskiĝa kvoto kreskis, sennombraj malkontentaj kamparanoj kaj judoj, kiuj vidis sin alfrontitaj kun nova konkurenco de maŝinoj, tekniko kaj industrio, elmigris al olcidenta Eŭropo kaj Ameriko. En la 1890-aj jaroj entute ĉirkaŭ 2,6 milionoj da poloj forlasis sian patrujon en la direkto de Usono, centmiloj elmigris al Sudameriko, Germanio, Ruslando kaj aliaj eŭropaj landoj. Malgraŭ tio, la loĝantaro de Kongresa Pollando kreskis inter 1863 kaj 1897 de 5 al 9,4 milionoj homoj. Tri kvaronoj de la laboranta popolo restis daŭre okupataj en la agrikulturo.

Inter la polaj partioj la kamparana partio, la partio de la kristandemokratoj kaj la socialisma partio estis la plej signifaj. La ĉi-lasta estis plej forta en la urboj de la rusa parto de Pollando kiel en Varsovio, Lodzo kaj Bjalistoko. Sub la gvido de la Naci-Demkoratia Partio (nomata Endecja) de ***Roman Dmowski*** (1864-1939) oni aplikis politikon de la kunlaboro kun la Ruslanda Imperio por atingi certajn proprajn politikajn celojn.

Kvankam sub Pjotr Stolypin, ruslanda ĉefministro inter 1906 kaj 1911, la polaj institucioj restis subpremataj, 50-60 polaj reprezentantoj estis elektitaj kiel deputitoj de la unua ruslanda Dumao de 1906. Post kiam en 1912 la nova ĉefministro, grafo V.N. Kokovcov, reemfazis la nedivideblan unuecon de la regno kaj la superecon de la rusa nacio, la etnaj minoritatoj sentis sin malagrable tuŝitaj kaj provokitaj. En la parlamento ili komencis perdi sian iaman statuson. La gvida rolo de la rusa lingvo estis rekonfirmita kiel deviga ŝtata lingvo. Kvankam en la Dumao rusaj naciistoj kaj dekstremaj radikaluloj okupis pli kaj pli da mandatoj, la poloj obstine insistis pri la solvado de la problemoj de sia nacio, kiu estis ignorata de la rusoj dum jarcentoj, kaj publike varbis por ĝia kompreno.

Sed la dilemo, en kiun glitis ĉiuj koncernataj flankoj, povis esti solvita nur parte. Krom la „juda demando“ restis la „pola demando“ kaj per tio ankaŭ la antagonismo inter judoj kaj poloj restis konservataj, kio komplikiĝis pro la interplektiĝo kun la rusa politiko rilate al la judoj kaj la religie influita pol-rusa antagonismo.

La „Granda Milito“, kiu eksplodis en 1914 kaj poste fariĝis pli konata kiel „Unua Mondmilito“, denove surtabligis la „polan demandon“ sur la eŭropa tagordo. La polaj teritorioj fariĝis ĉefa milita batalkampo en la oriento. La rusa armeo okupis Galicion, kio sekvigis kontraŭ-ofensivon de la germanoj kaj aŭstroj, kiuj sukcesis forpuŝi la rusojn el Kongresa Pollando en somero 1915, kie ili starigis germanan kaj aŭstran „ĝeneralajn guberniojn“ kun Varsovio kaj Lublino kiel ĉefurboj. La germanoj planis krei polan ŝtaton, kiu estu firme ligita kun la Prusa Reĝlando. La germana imperiestro kaj la prusa reĝo devis funkcii kiel armeaj ĉefkomandistoj, sed la poloj rajtis administri la landon. Kiel kandidatoj por la pola „trono“ estis konsiderataj ĉefduko Karlo Stefano de Aŭstrujo kaj ties plej maljuna filo Karlo Albreĥto de Habsburgo-Altenburgo. Fakte, ankaŭ la aŭstroj havis la ideon transpreni tutan Pollandon kaj aligi ĝin al nova „triisma“ monarkio en persona unio. Sed la aŭstraj germanoj kaj la hungaroj protestis kontraŭ tia intenco.

Do, finfine, la reganto de la germana ĝenerala gubernio de Varsovio, kiu ampleksis 62’000 km² kaj havis 6,4 milionojn da loĝantoj, fariĝis general-kolonelo ***Hans von Beseler*** (1850-1921) kun la titolo de ĝenerala guberniestro,[9] kiu estis rekte submetita al la germana imperiestro. La ĝenerala guberniestro de la aŭstra (lublina) gubernio nomiĝis Karl Kuk. La regionoj de Suwałki kaj Augustów estis aligitaj al la ´litova´ „Lando Ober Ost“, kiu same estis kontrolata de germanoj kaj al kiu apartenis ankaŭ Grodno kaj Bjalistoko.[10] Von Beseler, kiu apogis la ideon de sendependa pola ŝtato, ne kondutis kiel diktatoro, sed gvidis relative mildan reĝimon, klopodante konsideri la dezirojn de la poloj, de kiuj la germanoj dependis ĝis certa grado, se ili volis sukcese gvidi la landon. Li eĉ kontraŭstaris la planon de la germana militisto Erich Ludendorff, kiu celis efektivigi kvaran disdividon de Pollando kaj alimaniere misuzi kaj aneksi polan teritorion por la bono de Germanio. Cetere, Paul von Hindenburg kaj Erich Ludendorff montris sin en principo pretaj redoni Kongresan Pollandon al la rusoj je la kondiĉo de aparta pactraktato kun Ruslando. La civila administrado de la varsovia ĝenerala gubernio estis kontrolata de Wolfgang von

---

[9] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Generalgouvernement_Warschau_(1915%E2%80%931918) kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Hans_von_Beseler.
[10] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ober_Ost.

Kries, poste de Otto von Steinmeister (ĉi-duan Zamenhof, kiu forpasis en aprilo 1917, ne plu travivis). Fakte, la germanoj ne vere sciis kion fari kun Pollando politike, sed ekonomie ili ekspluatis ĝin, forprenante la teknikan infrastrukturon, kio kaŭzis malfortiĝon de la pola ekonomio kaj altan senlaborecon. Aliflanke, la germanoj konstruis novajn stratojn kaj fervojajn liniojn kaj evoluigis la Vistulon kiel transportvojon. Do, la germana politiko estis en Varsovio iom kontraŭdira kaj ambigua. La politikaj debatoj estis cenzuritaj, sed entute sub la germanoj la reĝimo estis pli milda ol sub la rusoj. La pola lingvo povis esti uzata en la lernejoj kaj en la tribunalo, kaj Varsovio ricevis universitaton kaj teknikan altlernejon.

La 5an de novembro 1916 la germana imperiestro Vilhelmo IIa kaj la aŭstra imperiestro Francisko Jozefo proklamis la starigon de nova pola reĝlando en la limoj de la teritorio, kiu ĝis nun apartenis al Ruslando. Tiu nova kreaĵo, kiu devis fariĝi intima aliancano de la „centraj potencoj“, estis nomata ankaŭ „Reĝlando de la regantoj“ (pole „Królewsto Regencyjne“),[11] ĉar post la regado de ĝia unua formala ŝtatestro, „kronmarŝalo“ Wacław Niemojewski (1916-17), ĝi estis poste regata de t.n. „Konsilioj de Regantoj“. Władysław Studnicki, ĉefo de la Klubo de la apogantoj de la pola ŝtateco, pledis por Pollando, kiu estu intime ligita kun la germana regno. En la komenco li eĉ gajnis la adeptojn de Piłsudski por tiu ideo, kaj en oktobro 1916 pola delegacio sub la gvido de Józef Brudziński eĉ vizitis la imperiestron kaj kancelieron en Berlino por trakti la detalojn. Ĉiuj tiuj groteskaj manipuloj montras, ke la germanoj ankoraŭ ne prenis definitivan decidon pri la sorto de la pola ŝtato. Sed unue ili devis solvi la problemojn de la milito.




Germana kaj aŭstra gubernioj kaj la „Lando Ober Ost“ (1916-18); Membroj de la „Konsilio de regantoj“, von Beseler, Dmowski, Piłsudski, Wilson; La pola ŝtato en 1918 kaj en la intermilita tempo.

Sed la aferoj malbone disvolviĝis por Germanio. La 25an de decembro 1916 kaj la 22an de januaro 1917 *Nikolao IIa* (1894-1917) kaj la usona prezidento Wilson pledis por la restarigo de sendependa pola ŝtato. Ĉi tiu procezo rapidiĝis post la abdiko de la rusa caro je la 15a de marto 1917 kaj la kreskanta disfalado de la germana okcidenta fronto. Ĉiuj polaj politikaj tendaroj interkonsentis pri restarigo de la pola sendependeco kiel eble plej rapide, por kio ili havis la firman subtenon de Usono, kiu pledis por la rajto de la popoloj mem decidi sian sorton. Komence de 1918 la „centraj potencoj“ postulis en Brest-Litovsk de Ruslando la sendependecon de Pollando. Post kiam la Germana Regno kaj Aŭstrujo-Hungarujo praktike perdis la militon kaj Ruslando dronis en la kaoso de la komunisma revolucio kaj intercivitana milito, Pollando reakiris sian sendependecon kun la subteno de la okcidentaj potencoj. Tiel, post 123

[11] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kingdom_of_Poland_(1916%E2%80%9318).

jaroj da nereala ekzistado, la pola nacio renaskiĝis el la cindroj de la milito kaj evitis sian definitivan estingiĝon. La 7an de oktobro 1918 en Varsovio la Reganta Konsilio, konsistanta el Józef Ostrowski, ĉefepiskopo Aleksander Kakowski kaj princo Zdzisław Lubomirski proklamis sendpendan polan ŝtaton. Laŭ la decido de la Versajla Traktato en 1919 Pollando fariĝis internacie agnoskita memstara respubliko. Marŝalo ***Józef Piłsudski*** (1867-1935), la gvidanto de la Sanacja-partio kaj kontraŭulo de Dmowski, provizore transprenis la povon kiel ŝtatestro kaj kunvokis novan Sejmon, kiu devis ellabori novan, demokratian konstitucion.

La Unua Mondmilito sekvigis ankaŭ la fondon de memstara Litova Respubliko, kiu estis proklamita la 16an de februaro 1918. La problemo de tiu juna ŝtato estis, ke ĝi apenaŭ povis defendi sin kontraŭ la teritoriaj ambicioj de Pollando, kiujn ĝi havis en la regionoj, kie plimulte vivis poloj, do precipe en la regiono ĉirkaŭ Vilno, kiu devis fariĝi nova litova ĉefurbo. En 1920 la trupoj de Piłsudski, la centra politikisto de la intermilita Pollando, okupis tiun regionon kadre de pol-litova milito. Pro tio Kaŭno fariĝis ĉefurbo de la nova litova ŝtato.

## La „juda demando“

Per la dividoj de Pollando-Litovujo, kiuj estis efektivigitaj de la registaroj de Ruslando, Prusujo kaj Aŭstrujo en la tempo inter 1771 kaj 1795, la Ruslanda Imperio heredis ne nur polajn, ukrainajn, blankrusajn kaj litovajn teritoriojn kaj popolojn, sed ankaŭ la grandan diasporan komunumon de la judoj, kiuj ekloĝis en la 11-14aj jarcentoj en Pollando kaj Litovujo laŭ invito de la tieaj reĝoj kaj grandprincoj.

La judaro, kiu amase venis precipe el Germanujo, estis estis perceptata kiel fremda kaj ekzota. La membroj de tiu tre speciala etne-religia grupo kun ĝia specifa sociekonomia strukturo, kiu estis konsiderata kiel „aparta nacio“, kiu ampleksis 900´000 anojn, kiuj fariĝis subuloj de la ruslanda caro post la dividoj de Pollando kaj Litovujo, metis la registaron en Peterburgo dekomence antaŭ ne malgrandaj defioj kaj problemoj. Tiel, la publike diskutata „juda demando“ estiĝis fakte post la ruslanda anekso de orienta Pollando, Volhinio, Podolio kaj Litovio, kiam carino Katerina IIa decidis aboli la specifan etne-religian statuson de la judoj por integradi ilin en la ekzistantan socian tavolaron de Ruslando. La riĉaj judoj estis enkadrigitaj en la tavolon de la rusaj gildaj komercistoj, kaj la malriĉa amaso estis aldonita al la tavolo de la etburĝoj. Tiel, la judoj ricevis samajn rajtojn kaj devojn kiel la kristana anaro de la urbaj tavoloj. Per tia reformo, kiu kongruis kun administra kaj jura egaligo, Katerina esperis efike utiligi la (ekonomiajn) kapablojn de la judoj kaj povi longdaŭre asimiladi ilin. Sed la egalrajta traktado de la judoj ne estis ebla sen burokratiaj reguligoj. Menciindas la cirkonstanco, ke en la rusaj dokumentoj la judoj estis nomataj „hebreoj“ (evrei), kio estis la nomo de religia komunumo, dum la nocio „judo“ (žid), kiu havis etne-nacian konnotacion, estis utiligata populare kaj pejorative. La rolo de la judoj kiel ekonomiaj perantoj, disdonantoj de kreditoj, etentreprenistoj, restoraciestroj, luantoj kaj luigantoj, metiistoj kaj administrantoj kaŭzis sur la kamparo la kontraŭstaron de la loka slava kaj kristana loĝantaro. Dum la rusoj timis la ekonomian konkurencon de la judoj, la poloj rifuzis ilian integradon en la urban administradon kaj la kristanan komunumon, kaj ĉie oni oponis kontraŭ la parta privilegiado de la judoj. Baldaŭ oni postulis konkretajn sankciojn kontraŭ la judoj, kaj per dekretoj oni ripete provis forpuŝi la judojn de la kamparo en la urbojn. Nature, la carista ŝtatadministracio klopodis dekomence kontroli la judan loĝantaron, plej bone se oni kuntenas ilin en aparta zono. Tiel, jam Katerina dekretis, ke la judoj rajtas loĝi kaj labori nur ene de tiel speciala loĝzono. Tiu loĝzono (kiu estis nomata en la rusa lingvo čerta osedlosti, en la pola lingvo strefa osiedlenia, en la ukraina smuga osilosti, en la hebrea tchum hamoshav kaj en la jida lingvo tchum-hamojshev[12]), kiu estis kreita per dekreto de la 23a de decembro 1791, ampleksis jenajn 15 guberniojn de la Ruslanda Imperio: Ĉernigov, Grodno, Ĥerson, Jekaterinoslav, Kiev, Kovno, Minsk, Mogiljov, Podol'sk, Poltava, Suwałki, Taŭrio, Vilno, Vitebsk, Volhinio kaj estis poste larĝigita al Kongresa Pollando kaj Besarabio. La zono validis ĝis 1917.

Post longa preparado, en 1804, caro de Ruslando intertempe estis Aleksandro Ia, estis dekretita la fifama „Statuto por la judoj“. Kvankam ĝi permesis al la judoj en ĉiuj bazaj viziti mezajn kaj altajn lernejojn de Ruslando kaj fondi judajn lernejojn mem, tiel longe ke la oficiala lingvo de la instruado

[12] En la angla lingvo kutimas la nocio Pale of Settlement kaj en la germana Ansiedlungsrayon.

estis la rusa, pola aŭ germana. La judoj devis unue adaptiĝi al la ĉirkaŭaĵo antaŭ ol ili rajtis ĝui la privilegion de la plena emancipiĝo.[13] Kvankam la judoj dume rajtis libere komercadi, la statuto tamen malpermesis al ili loĝi kaj labori kiel luantoj en vilaĝoj kaj vendi alkoholon al kamparanoj. Per tia konkreta malpermeso oni ne nur cementis la kliŝon de la judoj kiel avidaj trompaj restoraciestroj, sed miloj da judaj familioj fakte perdis sian ekonomian ekzistobazon. La imago pri la fremdeco de la judoj, kiuj estis konsiderataj kiel subevoluintaj kaj ties religio kiel danĝera, ebligis kulturi antaŭjuĝojn kontraŭ ili kaj firmigis la bildon, kiun multaj politikistoj kaj verkistoj havis pri judoj.

Por havi ilin je fora distanco, la statuto proponis al la judoj konstrui judajn koloniojn per ŝtata helpo, ekzemple en „Nova Ruslando“ en la sudo de la regno (sed en 1810 la projekto estis haltigita). En 1825 sekvis nova statuto, laŭ kiu la judoj devis esti forpelitaj laŭlonge de la okcidenta landlimo. Speciale okupata pri la „juda demando“ estis Pavel I. Pestel’, gvidanto de la kontraŭ-carismaj decembristoj (dekabristoj, 1825), kiu konsideris la judojn obstaklo por progresema ŝtato, ĉar li kredis, ke la lojaleco inter la judoj estas pli granda ol ilia rilato al la ruslanda ŝtato. Laŭ li la rabenoj havis tro grandan influon al la judoj, kiujn ili konsideris elektita popolo, kiu sentas sin supera al ĉiuj ceteraj popoloj. Aŭ la judoj sukcesos kunlabori kun la registaro, aŭ estus pli bone forpeli ilin al Proksima Azio (Palestino), kie ili povus konstrui propran ŝtaton. Aleksandro Ia, kiu favoris okcidentajn klerismajn ideojn, konsideris sia ĉeftasko konverti la ruslandajn judojn al la kristanismo por povi integri ilin en la ruslandan ŝtaton. Caro Nikolao Ia (1825-55) en principo daŭrigis la judan politikon de sia antaŭulo, sed neis ĉiujn esperojn je la emancipiĝo de la hebreoj kaj vastigis la devon de la armea servo al la subuloj kun mosea kredo (en 1842 oni enkondukis la ĝeneralan devigan armean servon, kiu daŭris 25 jarojn). Per la fifamaj kaj rigore praktikataj „kantonistaj“ dekretoj la neplenkreskaj judoj devis esti transdonitaj al specialaj institucioj, por ke ili tie estu trejnitaj por la militservo. La plimulto de tiuj ok- ĝis dekdujaraĝuloj, kiuj estis brutale forprenitaj de siaj gepatroj, retroviĝis en Siberio, kie komenciĝis ilia rekruta vivo, kiu daŭris kvaronan jarcenton. Laŭ tiu maniero tiuj infanoj devis esti preparitaj al la perforta bapto. Se ili kontraŭstaris ĝin, ili estis traktataj per turmentado. La rimedoj estis sankciitaj de la Sankta Sinodo, la plej supra eklezia instanco de Ruslando. Ĉar multaj el tiuj viktimoj preferis morti, okazis amasaj suicidoj. Tiuj, kiuj estis perforte konvertitaj, revenis al sia malnova kredo post la morto de la caro. Reformkomisiono, kiu estis starigita en 1840, venis al la konkludo, ke la judoj malrespektas la „burĝan ordon“, ĉar ili atendas al alvenon de la mesio.

Kun la celo detrui la apartan grupan identecon de la judoj, ili estis dividitaj laŭ kvin profesiaj klasoj: komercistoj, kamparanoj, metiistoj, konstante loĝantaj urbanoj kaj urbanoj sen fiksa loĝloko. Krom tio, oni arogis al si distingi la „utilajn“ elementojn de la juda popolo por povi pli bone diskriminacii la „malutilajn” elementojn. Kiel malutilaj elementoj estis deklaritaj komceristoj, oraĵistoj kaj lernantoj – ili estis envicigitaj inter la soldatoj. Ingold (1981) klarigis, ke en Ruslando – kaj en tio ĝi ne diferencis de la ŝtatoj en okcidenta Eŭropo – oni distingis inter „judoj, kiujn oni deziris kaj bezonis, kaj judoj, kiuj restis nedezirataj“. La unuan kategorion konsistigis precipe judaj grandkomercistoj kaj la klera juda inteligencio, dum al la dua kategorio apartenis la malklera amaso de la juda popolo. Tiel, nur relative malgranda parto de „esceptaj riĉaj judoj“ kaj „esceptaj kleraj judoj“ ĝuis la leĝajn faciligojn kaj ricevis ekonomiajn privilegiojn, kiuj estis fiksitaj en diversaj „ediktoj de tolero“ de la jaroj 1856 ĝis 1867. Judoj sen necesaj posedaĵoj aŭ bezonata klereco estis konsiderataj kiel neasimileblaj civitanoj (aŭ subuloj) de la dua klaso. Sed tiujn oni ankaŭ celis rusigi laŭ tiu aŭ alia maniero. Estas evidente, ke tiu duklasa traktado de la judoj kondukis al novaj tensioj kaj problemoj. Flanke de la kerna loĝantaro la ekonomie sukcesaj judoj estis konsiderataj kiel plutokratia klaso, kio kaŭzis, ke oni malrespektis ilin kiel ekspluatantojn kaj parazitojn. Por sekurigi al si la subtenon de la altnivela juda financklaso, la carisma registaro zorgis rekte aŭ malrekte, ke la speciala statuso por judoj estu konservata. Alia tragiko de tiu evoluo situis en la cirkonstanco, ke parto de la progresema juda inteligencio subtenis la pli postan antisemitisman rusigan politikon de la carisma burokratio.

Ioman esperon por la judoj signifis la ministro pri popola klerigo, grafo Sergeo Uvarov, kiu rilatis kun okcidentaj intelektuloj kaj kiel prezidanto de la Moskva Akademio de la Sciencoj instalis en

[13] Pri la signifo de la juda emancipiĝo oni povas legi en diversaj lingvoj sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Juda_emancipiĝo.

1841 specialajn lernejojn por judoj, kies gvidadon transprenis okcidentaj klerigistoj. Krom en la ukrainaj kaj blankrusaj urboj, tiaj lernejoj ekzistis ankaŭ en Kovno, Grodno kaj Bjalistoko.

La nova caro Aleksandro IIa (1855-81) ŝajnigis inaŭguri novan fazon, pli bonajn tempojn por la ruslanda judaro. Kvankam ankaŭ la nova imperiestro ne estis libera de la antaŭjuĝoj de sia patro rilate al la judoj, li tamen reekzamenigis la validajn judajn leĝojn kaj postuli ilian adaptadon al la novaj kondiĉoj, „se la etika stato de la judoj permesas tion“ (!). Oni aktivigis specialan komitaton por la socia integrado de la judoj, kiu sekvis al dekreto de 1856 kun gvidlinioj pri la „kunfandado de tiu popolo kun la loka popolo“. Per la larĝigo de la burĝaj rajtoj kaj la garantiado de materiaj avantaĝoj la judoj devis esti gajnitaj por la registara politiko de la asimilado por forigi la sentatan antagonismon inter la juda kaj la kerna popolo. La longdaŭre antaŭvidita solvo de la „juda demando“ konsistis en Ruslando do en tio, havigi al la judoj necesan kvanton de burĝaj rajtoj, se ili pretas kvazaŭ rezigni pri sia judeco kaj kvazaŭ ‚kunfandiĝi’ kun la cetera popolo.


Sub la kondiĉoj de la klerisma aŭtokrateco de la caro sub Aleksandro IIa estis nuligitaj aro da specialaj leĝoj, kiuj limigis la liberecon de la judoj, por prepari la vojon al ilia emancipiĝo kiel ŝtataj civitanoj. Inter la unuaj konkretaj rimedoj de la „liberiga caro“ troviĝis la nuligo de la fifamaj kantonistaj dekretoj, kaj sur la kampo de la deviga armea servo oni enkondukis ĝeneralan egalrajtigon de la judoj kun la kristanaj subuloj. La loĝzono por judoj restis konservata, sed la eblecoj por moviĝi ene de la zono estis iomete larĝigitaj. En la pola reĝlando (Kongresa Pollando) la limigoj estis malpli drastaj ol en la ruslanda loĝzono. Sed ĉar oni opiniis, ke la celo de la civila reedukado de la judoj, la ŝanĝado de ilia vivoformo kaj ilia kondukado al ‚utilaj’ okupoj ankoraŭ ne estis atingitaj, la reformkomisiono de la ministro pri internaj aferoj, S.S. Lanskoj, konsideris la nuligon de la limigoj por loĝado ne celkonformaj. Tiu ĉi opinio eĉ kongruis kun la sinteno de la klerisma oficistaro de meza Eŭropo. Surbaze de tiu modelo en Ruslando okazis kelkaj paŝoj, kiuj malfermis al la judoj la vojon al liberaligo de ilia statuso kiel ŝtataj civitanoj. En 1856 judaj docentoj rajtis instrui en ŝtataj universitatoj, kaj kelkajn jarojn poste ankaŭ nediplomitaj judaj kuracistoj kaj apotekistoj akiris la rajton labori. En 1861 ĉiuj judoj, kiuj posedis universitatan diplomon, ricevis la rajton libere loĝi en la lando, kaj en la pola reĝlando la judoj ricevis en 1862 krom la eblo libere loĝi en urboj novajn rajtojn, kiuj fortigis ilian emancipiĝon. Sur la ekonomia kampo post la liberigo de la kamparanoj multaj judaj komisaroj kaj komercistoj povis partopreni en la spekulado pri la tero kaj multigi sian klientaron. Nature, tiuj rimedoj koncernis nur relative malgrandan parton de la ruslanda judaro, dum grandparto de la juda popolo daŭre vivaĉis sub mizeraj kondiĉoj en sia loĝzono, en kiu ili restis enŝlositaj kvazaŭ kiel en grandega geto aŭ prizono. Ekzistis nur malmultaj asimiliĝintaj judoj, ĉar perforta transformado de la juda vivmaniero (kiu inkluzivis ankaŭ la transprenon de nova religio) povis konduki al neantaŭvideblaj evoluoj. La klerigisto Max Lilienthal raportis meze de la 19a jarcento, ke la judaro en Ruslando havis profunde orientecajn trajtojn. Do, la judoj de Ruslando formis fermitan socian grupon, kiu vivis laŭ propraj komunaj tradicioj, moroj kaj kutimoj. Plej malfrue en 1874, kiam la pola aŭtonomeco estis pli malpli likvidita, ankaŭ la judoj nenion plu signifis kaj por la poloj kaj por la rusoj. Tio estis la realeco, kiun Zamenhof retrovis en sia (nova) „pola“ patrujo.[14]

En artikolo 44 de la Berlina Traktato de 1878 la postulo pri la emancipiĝo de la judoj unuafoje estis integrita en internacia kontrakto, tiel ke ilia egaligo fariĝis deviga normo de la internacia juro sur eŭropa nivelo. Ankaŭ Ruslando ne povis nei tiun normon, se ĝi ne volis fariĝi diplomatie izolita. Komence tiu oficiala juda politiko (kiu en la kerno neniam estis tute libera de antisemitismaj premisoj) eĉ havis certan sukceson. Sed, paradokse, la liberaligo ne kondukis al ĝenerala kaj plena emancipiĝo de la judoj, sed, male, eĉ al pli da kontraŭ-judaj sentoj kaj pogromoj, kiujn la aŭtoritatoj eĉ pli favoris ol efike evitis (cetere, Pinkwasser konsideris la kontraŭ-judajn pogromojn en Ruslando kaj Pollando malpli religie aŭ rasisme, sed ĉefe ekonomie motivitaj). En Ruslando sin tenis la akuzo, ke la komunumaj organizaĵoj de la judoj, kiujn Nikolao malfondis en 1844, daŭre ekzistas, nome kiel sekreta juda registaro, kiu estas aktive ligita kun la interesoj de eksterlando.

La murdo de la „liberiga caro“ je la 1a (13a) de marto 1881 aprubte ĉesigis tiun evoluon kaj radikale ŝanĝis la politikan situacon en Ruslando. Malfeliĉe, inter la konspirintoj troviĝis iu virino kun la nomo Hesja Hel’fman, kiu konservis en sia loĝejo eksplodaĵon kaj estis identigita kiel judino el Blankrusujo. Tuj post la kronigo de la nova caro (kiu okazis nur du jarojn post lia sukceco) estis anoncita nova politiko, kiu sekvigis ampleksajn pogromojn kontraŭ la juda loĝantaro en la sudo de la lando, antaŭ ĉio en Ukrainio. Aleksandro IIIa, kiu havis fortajn antaŭjuĝojn kontraŭ judoj, kiujn li tute ne ŝatis

14 En 1873 L.L. Zamenhof translokiĝis kun sia familio de Bjalistoko, kiu troviĝis en la okcidentrusa gubernio Grodno, al la pola reĝlando (Kongresa Pollando).

(sed ankaŭ ne konis), esprimis sin en tiu senco, ke la pogromoj estas puno de dio, ĉar finfine la judoj krucumis Jesuon, kiel la kristanoj kredis. Pro tio estus bone, se oni batus la judojn, kvankam laŭ ŝtata moralo tio ne estas permesata. Pli malbone estis la rifuzo de Aleksandro agnoski, ke la judoj staras sub la protekto de la ŝtato. Ĉefa reprezentanto de tiu nova kontraŭ-juda politiko fariĝis N.P. Ignat'ev, ministro pri internaj aferoj, kiu formis la malamikecon kontraŭ la judoj kiel ŝtatan instrumenton. Li klarigis, ke la judoj neniel rajtas translokiĝi de la loĝzono al la ceteraj partoj de Ruslando, aliflanke li ankaŭ mesaĝis, ke kontraŭ la elmigrado de la judoj ekzistas neniu obstaklo. En la senco de la moderna antisemitismo la pogromoj, kiuj estis stiritaj de registaraj agentoj (kaj de germanaj antisemitoj) povis disvastiĝi sen malhelpo.[15] La aŭtoritatoj eĉ toleris tiun „popolmovadon“ kontraŭ la judoj, rezignante disponigi polican protekton. La fifamaj „majaj leĝoj“ de la jaro 1881 (kiuj estis nuligitaj nur en februaro 1917) estis adoptitaj kiel reago al la pogromoj kaj celis limigi la liberecon de la ruslandaj judoj moviĝi kaj loĝi en la lando. Oni malpermesis certajn profesiojn, faris konfiskojn, limigis liberecojn en la kleriga sistemo kaj forpelis judojn. Krom tio oni malpermesis al la judoj komerci dum dimanĉo kaj kristanaj festotagoj. Tiel, oni forprenis de la judoj antaŭe donitajn rajtojn, kaj tiel la situacio en la loĝzono rapide malboniĝis. Post la demisio de Ignat'ev, al kiu oni riproĉis, ke li misuzis la kontraŭjudan etoson kaj nenion kapablis fari por eviti pogromojn, grafo Dmitrij Tolstoj, la nova ministro pri internaj aferoj, ordonis haltigi la „poplmovadon“ kontraŭ la judoj. Kvankam nova komisiono sub la gvido de grafo v. Pahlen venis al la konkludo, ke estas necese larĝigi la rajtojn de la judoj paŝon post paŝo por atingi la egaligon kun la kristana popolo, caro Aleksandro rifuzis tiun rekomendon kaj decidis konservi la limigojn kaj malpermesojn por la judoj. Tiel, la situacio draste malboniĝis por la judoj. Iliaj loĝeblecoj estis denove limigitaj, kaj oni enkondukis la ‚numerus clausus' por la judoj ĉe diversaj profesioj. En 1891 oni forpelis ĉirkaŭ 20´000 judojn el Moskvo.




Loĝzono de la judoj en la Ruslanda Imperio (Fonto: https://de.wikipedia.org/wiki/Ansiedlungsrayon)

Sub Nikolao IIa la kontraŭ-juda politiko estis konservata kaj la limigoj eĉ pli draste aplikataj.

La malamikeco kontraŭ judoj havis larĝan disvastiĝon en Ruslando, sed probable ĝi ne estis esence pli forta ol la ´kutima´ ksenofobio de rusoj kaj kristanoj rilate al aliaj minoritatoj kiel ekzemple islamanoj aŭ aliaj marĝenaj grupoj. La rusa verkisto Fjodor Dostoevskij (1821-81) asertis en sia ‚Taglibro der verkisto', ke flanke de la rusa popolo malamikeco kontraŭ la judoj, kiu baziĝas sur antaŭjuĝoj, *ne* ekzistas. Eblus paroli maksimume pri forta antipatio de la rusoj rilate al la judoj, precipe en certaj regionoj. Laŭ li tiu malŝato ne baziĝis sur tio, ke la judoj estas judoj, do ne sur ia nacia aŭ religia malamo, sed sur tute aliaj kaŭzoj, pri kiuj ne kulpas la autoĥtona loĝantaro, sed la judoj mem. La

15 Tiuj pogromoj estis unuafoje priskrbitaj de Simon Dubnov, kiu originis el Blankrusujo, en sia ampleksa verko pri la monda historio de la juda popolo.

ĉefa problemo estus la individuaj rajtoj de la diversaj popoloj de la imperio. La reciprokaj akuzoj estus troigitaj. Laŭ Dostoevskij ne ekzistas pli sentemaj kaj provokeblaj homoj ol la kleraj judoj, kaj ekzistas neniu, kiu estas tiel facile ofendebla ‚kiel judo'. Do, ne la rusa popoloj sola kulpas pri la kaŭzoj de la reciproka distanciĝo. Dum la judoj kriis kaj lamentis, ke ili estas subpremataj kaj turmentataj, ili samtempe tute ne sentis kompaton kun la rusoj, kiuj same kiel ĉiuj aliaj suferis sub la servuteco. Post la liberigo de la kamparanoj la judoj estis la unuaj, kiuj elpaŝis kiel profitantoj, posedantoj de farmbienoj kaj restoracioj kaj do okupis siajn terenojn. Malgraŭ tiu humiligo la rusa popolo estus preta akcepti la judojn en la unuiĝon de la frataro, sendepende de la diferenco de la kredo kaj kun plena respekto de la historia fakto de tiu diferenco. Sed la frateco, la perfekta frateco, postulus la fratecon de ambaŭ flankoj (Ingold, Dostojevskij, 1981). Ŝajnas, ke Solĵenicyn en sia libro „Ducent jarojn kune" en principo transprenis tiujn vidpunktojn.[16]

Nature, en Ruslando certaj aktivaj antisemitismaj medioj disvastigis en sia gazetaro la konstruitan hipotezon pri la juda ŝtato en la ŝtato. Precipe la t.n. „Protokoloj de la Cionaj Saĝuloj" (1895), kiuj estiĝis en la medio de la ruslanda sekreta polico, kiuj estis popularigitaj de antisemitismaj medioj kaj laŭ kiuj la judoj planas grandan konspiron por transpreni la regadon de la mondo, ne maltrafis sian efikon, kvankam tiu verkaĵo estis falsaĵo.

Aliflanke, en la novaj liberalaj kaj socialismaj partioj formiĝis ankaŭ protesto kontraŭ tiuj faroj. La rilato inter la registara politiko kaj pogromoj fariĝis evidenta, kaj verkistoj kiel Vladimir S. Solovjov (1853-1900), Lev N. Tolstoj (18281910), Vladimir Korolenko (1853-1921) kaj Maksim Gor'kij (1868-1936) defendis la judojn. La religia filozofo Solovjov eĉ pledis por la unueco de judoj kaj kristanoj kaj rekomendis rezigni pri la akuzado de la judoj, ĉar iliaj agoj ne „estas pli malbonaj ol niaj".

Bedaŭrinde, ankaŭ post la komenco de la nova jarcento eksplodis ampleksa ondo de pogromoj, kiuj kaŭzis multnombrajn viktimojn, ekzemple en Kiŝinjov (Besarabio) kaj Gomel' (Blankrusujo), sed ankaŭ en Odeso, Bjalistoko kaj Siedlce (Pollando), en 1905 kaj 1906. V.K. von Pleve, Ministro pri internaj aferoj, ĵetis oleon en la fajron kaj deklaris la masakrojn kiel agojn de la kristana popolo por protesti kaj venĝi sin kontraŭ judaj revoluciuloj. Do, la retorika kaj emocia klimato estis ege varma.

Post la detruado de la rusa floto en la Batalo de Tsuŝimo (majo 1905), la fajro de la rusa revolucio ekflamis eĉ pli forte kaj ne estis libera de kontraŭjudaj emocioj flanke de la soldatoj. Tiuj, kiuj ricevis la honoron mortigi revoluciulojn kaj judojn, estis la batalantoj de la „Nigra Cento". Ili ĝuis la subtenon de la popolo kaj de la lokaj aŭtoritatoj, policistoj ricevis ordenojn. La alvokoj de la ‚pacifistoj' Solovjov, Tolstoj, Korolenko kaj Gor'kij restis senefikaj, same la protestoj de la rusa inteligencio kaj de parto de la supera tavolo. La registaro utiligis laŭ malnova maniero la kontraŭ-judan etoson de la plebo por deflankigi ĝin de la internaj problemoj.

Multaj aktivuloj de la juda klerismo, inter ili L.L. Zamenhof mem, faris la sperton, ke la asimilado kaj profana klereco ne kondukis la judojn al la esperata jura kaj socia situacio. La elmigrado de milionoj da judoj al Okcidento kaj diversaj pogromoj kondukis la projektojn de la asimilado kaj klerigo de la judoj en la sakstraton. Ju pli da judoj ricevis profanan klerigon, des pli akraj fariĝis la antisemitisma kontraŭstaro kontraŭ la juda inteligencio kaj ilia emancipiĝo, en kiu kunlaboris kristan-konservemaj kaj naciismaj fortoj. Dum la emancipiĝo de la judoj realiĝis per la franca revolucio en okcidenta kaj meza Eŭropo (kaj en Ameriko) en la daŭro de la 19a jarcento, kie la judoj praktike fariĝis egalrajtaj civitanoj de siaj ŝtatoj, en la Ruslanda Imperio tiu projekto fariĝis utopia kaj povis efektiviĝi nur en 1917, la 25an de marto (3an de aprilo), kiam la Kerenskij-registaro abolis ĉiujn limigojn por la judoj. Sed la momento por tio estis evidenta tro malfrua. Ne malmultaj judoj partoprenis kiel gvidaj protagonistoj de la Rusa Revolucio…

[16] Intertempe mi legis ankaŭ la unuan volumon de la libro „Ducent jarojn kune" de A. Solĵenicyn, kiun li publikigis en 2001 (germana eldono en 2002) kaj kiu traktas la historion de la judoj en Ruslando ekde la komenco ĝis 1917. Temas pri ampleksa, peza kaj malfacile digesteba ´nutraĵo´ (kiun oni devus plurfoje ´remaĉi´ por kompreni ĉiujn detalojn kaj facetojn). Ĝin mi ne povis konsideri en tiu ĉi konciza analizo. Certe, necesus serioze trakti la analizojn, asertojn kaj konkludojn en tiu verko, kiu ŝajnas (kaj evidente celas) revizii la ĝisnunan historion de la ruslandaj judoj, kio ege komplikas la ĝustajn percepton, komprenon kaj interpretadon de tiu historio kaj de la rolo, kiun la judoj ludis en ĝi. Internacie, la verko estis grandparte negative akceptita kaj recenzita, ĉar oni kredis malkovri en ĝi naciismajn kaj antisemitismajn tendencojn kaj intencojn de la aŭtoro kun la provo kulpigi la judojn kaj absolvi la rusojn.

## Pol-judaj rilatoj

Ankaŭ la pol-judaj rilatoj havas same kiel la rus-judaj rilatoj sian historion, kiu devas esti konsiderata kaj traktata aparte. Inter poloj kaj judoj ekzistis multnombraj rilatoj, ĉar ambaŭ etnaj-religiaj grupoj vivis de jarcentoj en proksima najbareco, eĉ se konfliktoj, kontraŭdiroj, antaŭjuĝoj, malfido kaj ĵaluzo apartenis al la ĉiutaga vivo kaj riski disigi polojn kaj judojn. La jena konstato eble sonas banale, sed estas grave atentigi, ke la judoj de Pollando ne komprenis sin poloj.

Malnova Pollando-Litovujo estis fama pro sia toleremo rilate al religiaj minoritatoj (precipe antaŭ 1496), tiel ke tiuj teritorioj estis glorataj kiel „sankta lando de la judoj", „dua patrujo de la judoj" kaj „juda paradizo". Depost 1246 la judoj ĝuis privilegiojn, kiujn la polaj reĝoj donis al ili kaj kiuj reguligis la jurajn kaj ekonomiajn rilatojn. En ekonomia rilato la polaj reĝoj dependis de la judoj, ĉar ili aktivigis la polan komercon kaj servis kiel signifaj impostfontoj.

Ĝenerale, judoj estis pli kleraj ol la resto de la loĝantaro, ĉar la judoj, kiuj venis al Pollando (jide Pojln), kunportis altnivelan spiritan tradicion de la klerismo, kiu helpis al ili konservi sian identecon dum jarcentoj.

Kun la tempopaso elkristaliĝis la opinio, ke la judaro de Pollando estas ‚corpus in corpore' kun ‚status in statu', t.e. „nacio en la ŝtata popolo" kun speciala statuso. Apud la polaj tavoloj de la nobelaro (ŝlaĥto), urbanoj, kamparanoj kaj ekleziularo la judoj reprezentis ‚specialan (ekskluzivan) tavolon'. La judoj loĝis en propraj urbaj kvartaloj, kie kristanoj ne rajtis loĝi, ĉar laŭ certaj sinodaj decidoj de la romkatolika eklezio la kristanoj ne rajtis formi komunan komunumon kun la judoj kaj ankaŭ ne devis loĝi kune kun ili.

Siaflanke, la judoj kuniĝis en firma ĝenerala organizaĵo aŭ institucio de la judaro en Pollando: La Vado, kiu estis la juda parlamento, formis kiel oficiala politika reprezentantejo de la pollanda judaro la perilon inter ŝtato kaj la tuta judaro. La Vado, kiu estis imitaĵo de la pola Sejmo, signifis esprimilon de la forta interna komuneco kaj aŭtarkio de la judaro, kiu pli kaj pli komprenis sin propra nacio. La decidoj de la Vado estis verkitaj en la hebrea lingvo. Post 1496 oni provis limigi la influon de la judoj. Kadre de la Sejmo de 1532 la „juda demando" estis unuafoje kritike diskutata. Sekve, al la judoj oni malpermesis aron da ekonomiaj okupoj, kio kondukis al komerca lukto.

Kiel Eva Hoffmann konstatis, kiu en sia libro ‚En la ŝtetlo' (laŭ la ekzemplo de Brańsk) esploris la pol-judajn rilatojn ĝis la dividoj de Pollando, la pol-juda eksperimento travivis plurajn fazojn en diversaj tempoj. En la antaŭmoderna tempo la politika sinteno rilate al religiaj minoritatoj estis fakte mirinde liberala. La rilatoj inter poloj kaj judoj kiel simbiozo inter plimulto kaj malplimulto malboniĝis en la mezo de la 17a jarcento pro la ekonomia kaj politika degenero de la lando. En 1764 la Sejmo malpermesis ĉiujn judajn kunvenojn. Do, la speciala statuso de la judoj estis minacata, kaj la judaj komunumoj mem komencis degeneri. Ekster la malnovaj centroj de la rabena aŭtoritateco la judoj komencis neglekti siajn religiajn leĝojn. Kelkaj judoj estis eĉ tiel indiferentaj, ke ili ne plu scipovis paroli aŭ legi la hebrean lingvon, kaj aliaj neglektis obei la Toraon. Oni vidis dancadi junajn judinojn dum festotagoj, kio egalis al herezo, kaj judaj buĉistoj forgesis kiel oni praktikas la ŝoĥtadon, tiel ke koŝera viando ne plu povis esti produktata. Okazis klopodoj konduki judojn al la bapto sen integri ilin en la polan socion.

Malgraŭ la impreso pri certagrada romantiko, kiu povas estiĝi lige kun la priskribo de la religia toleremo en la antaŭmoderna Pollando, la alia flanko de la medalo, tiu de la antaŭjuĝoj kontraŭ ĉio fremda, ne estu ignorata. En Pollando la judoj faris ĝis certa grado celo de atakoj kaj malfido kiel aliaj eksterlandanoj – krom judoj ekzistis ne malgrandaj malplimultoj de armenoj, skotoj kaj italoj. Pro iliaj akre odorantaj manĝaĵoj kaj ilia stranga lingvo la fremduloj estis ofte primokataj en kantoj kaj en la literaturo. Al ili oni ankaŭ riproĉis troajn kapablon kaj ruzecon por ekpluati la malriĉajn, senhelpajn kaj laŭdire stultajn polojn.

La kontraŭ-judismo komencis manifestiĝi en Pollando sufiĉe frue, nome kiam la katolikismo pli profunde enradikiĝis kaj la eklezio stabiligis sian monopolisman religian regadon. La katolikaj ekleziuloj ne hezitis malbridi sian judfobion, kiu esprimiĝis ekzemple en akraj tekstoj, teatraĵoj kaj katolikaj moralpredikoj, en kiuj la judo estis pentrita kiel malbela dubinda figuro, ridinda karikaturo, kiu malbone parolis la polan lingvon kaj pretis humiliĝi por sekurigi al si financajn avantaĝojn. La judoj transprenis grandparte la terenojn, kiujn la poloj abomenis: komercon kaj financojn, kun ĉiuj sekvoj, kiuj estis ligitaj kun tio. Kio koncernas la kunlaboron de judoj kun la pola nobelaro, temis pli multe pri pragmatisma rilato ol pri reciproka ŝato, kaj ĝi baziĝis sur reciprokaj avantaĝoj kaj profitoj. Estas do

tute klare, ke ekde la komenco de la historio de la jud-polaj rilatoj la tensioj inter tiuj du popolgrupoj konsiderinde kreskis kaj fortiĝis.

Aliflanke la unuiĝo de la ŝlaĥto kun la judoj kondukis al konfuzo en aliaj sociaj tavoloj, ekzemple ĉe polaj etburĝoj, kiuj troviĝis en rekta konkurenco kun judaj komercistoj, kaj kiuj ne timis protesti kontraŭ la favorado de la judoj. Sur la plej suba tavola nivelo de la socio, la kamparanoj renkontis la judojn kun superstiĉo kaj timo. La kamparanaj legendoj vidis ĉe la judoj ekzisti supernaturajn fortojn kaj strangajn morojn. Tiel oni ekzemple kredis, ke la judoj naskiĝas blindaj kaj bezonas sangon por fariĝi vidantaj. En tiu rilato precipe en orienta Eŭropo krom la akuzoj pri la murdo de dio restis malnovaj kontraŭjudaj antaŭjuĝoj kiel la rituala murdo, la profanigo de hostioj, la venenado de putoj kaj la internacia konspirado. Sed ne nur la judoj fariĝis por poloj principe aliaj homoj. La sama opinio ekzistis ankaŭ en la inversa senco. Al la judoj kiel minoritato estis tute klare, ke en la gastiganta lando ili estas nur provizore tolerataj. Ĉar ili vivis sen ŝtataneco en fremda lando, la judoj devis enkalkuli laŭsperte la riskon, ke ili povas esti persekutitaj kaj forpelitaj el la lando en ajna momento. Tiel, la judoj evoluigis iun manieron vivi (´modus vivendi´) inter ekzista malcerteco kaj adaptiĝemo kun la celo esti komprenata de la aliaj kaj akiri ilian favoron. Alia opcio krom nura paca kunekzistado ne ekzistis. Sed en Pollando la judoj ne estis devigataj elmigri aŭ asimiliĝi, kaj ili ankaŭ ne esprimis la deziron asimiliĝi, ĉar en multaj pasintaj jarcentoj de la migrado kaj ekzilo la obstina volo de tiu popolo estis konservi senŝanĝe la propran identecon, resti fidela al la instruoj de la prapatroj kaj ne interrompi la kontinuecon. La debato pri la „juda demando“ atingis sian politikan kulminon dum la Kvarjara Sejmo de 1788-92, kiam ĝi devis decidi pri la civitanaj kaj loĝrajtoj de la judoj, same pri la nuligo de kelkaj rajtoj por ili.

La ĉefa opozicio kontraŭ la civitanigo de la judoj venis de la urbanoj, kies propraj rajtoj mem ne estis sekuraj. La liberaj civitanoj sentis sin minacataj pro la konkurenco de la judoj. La akuta rivaleco inter tiuj grupoj manifestiĝis jam en 1790 en kontraŭjudaj protestoj en Varsovio, kiuj sekvigis, ke la ĝenerala opinio pri la judoj ne esence ŝanĝis ilian statuson.

Komence de la 18a jarcento en la pola Sejmo oni traktis la tiel nomatan Czacki-projekton, kiu estis politike kaj historie signifa por la pola „juda demando“. Religio kaj lingvo (hebrea) de la judoj ne devis esti tuŝataj, kaj kiel kondiĉon por la solvo de la juda demando oni postulis kleriĝon. Sub la impreso de Jean-Jacques Rousseau kaj John Locke la judoj devis esti agnoskitaj kiel politike egalrajtaj civitanoj. La kerna demando de la tuta diskuto estis: Ĉu la judoj entute apartenu al la pola nacio? Ĉar laŭ la aktuala pola doktrino kaj la praktiko de la socia ordo sub la nacio oni komprenis nur la nobelaron. Ankoraŭ en la fama konstitucio de la 3a de majo 1791 ĉi tiu demando estis nerekte neita. Kiel sola oficiala „pola religio“ estis permesata nur la „sankta romkatolika eklezio kun ĉiuj siaj leĝoj“. La transiro (konvertiĝo) de unu konfeso al alia estis malpermesita kaj punebla. Tamen, la religia libereco estis garantiata pro la principo de la karitato. Praktike tio signifis, ke la judoj estis ekskluditaj el la nacio.

Malgraŭ tio, Tadeusz Kościuszko (1746-1817), la batalanto por libereco de 1794, antaŭvidis la egalrajtigon de la judoj (kaj aliaj minoritatoj), kaj sub la gvido de Berek Joselewicz oni eĉ starigis judan legion. Post tio sekvis la divido de Pollando.

Ambaŭ flankoj riproĉis unu la alian: Konservemuloj de Pollando kredis, ke la judoj ne meritas samajn rajtojn tiel longe ke ili tenas sin distancitaj de la poloj; krom tio, ili timis, ke la judoj povus forpuŝi la polojn, se ili ricevas samajn rajtojn. Aliflanke, multaj judoj opiniis, ke la poloj tro malmulte helpis al ili por plene meriti ilian lojalecon, kaj ili timis, ke la interagado povus sekvigi perdon de la identeco. La kleraj hebreoj estis konvinkitaj, ke la polaj judoj devus aliĝi al la regantaj kondiĉoj por fariĝi aktivaj membroj de la socio. Tiel, tiuj diskutoj kondukis ne nur al la demando, kiu grupo kulpas, sed fariĝis ankaŭ nova eksplodaĵo kaj ilo por reciproka distanciĝo.

En la Varsovia Duklando la judoj ricevis de iure burĝajn kaj politikajn rajtojn, sed ili dependis de kondiĉoj kiel la plenumo de dekjara armea servo, de ilia asimiliĝo kaj de pagendaj kotizoj.

En „Kongresa Pollando“ (t.e. rusa aŭ reĝa Pollando) la ‚franca’ konstitucio restis plu valida, ankaŭ por la judoj, kaj la „juda demando“ okupis la registaron kaj la publikon same kiel antaŭe. La pola ŝtata konsilio rilatis konfuzite pri la proponitaj judaj reformoj. Oni opiniis, ke unue la judoj devus sennaciiĝi , t.e. senjudiĝi kaj fariĝi poloj, antaŭ ol ili povu fariĝi civitanoj.

Malgraŭ judfobiaj tendencoj, en la pola ribelo de 1830/31 oni komprenis, ke ĉiuj homoj vivantaj en Pollando povus esti anoj de la pola nacio. La sorton de Pollando oni mesiisme komparis kun tiu de la suferanta Jesuo. Adam Mickiewicz, la ‚poeta reĝo’ de Pollando, klarigis, ke la juda mesiismo efikis al la pola mesiismo kaj ke la juda popolo ne hazarde aŭ vane elektis Pollandon kiel patrujon. Laŭ la kompreno de Mickiewicz, la judoj estis „niaj pli maljunaj fratoj“ kaj devis aparteni al la pola nacio kiel egalrajtaj civitanoj. Ĉi tiu opinio estis dividita de multaj homoj, nome kaj de la demokratoj kaj de la

konservemuloj. Ankaŭ la pola liberec-batalanto Joachim Lelewel (1786-1861) vidis la „israelidan popolon“ ekzisti „manojn en manoj kun siaj polaj fratoj“. Flanke de la pola itala legio, kiu estis fondita de Mickiewicz, ankaŭ judoj partoprenis en la komuna batalo por la libereco. En februaro 1861 en Varsovio okazis granda manifestacio por la libereco de Pollando, ĉe kies sufokado pereis kvin partoprenantoj. Kiel oni povas vidi en pentraĵo de la juda artisto Aleksandro Lesser (1867), en la funebra ceremonio partoprenis manojn en manoj du rabenoj kun kristanaj eklezianoj, kaj al delegacio de la urbo Varsovio aliĝis kelkaj homoj de juda deveno. Unu el ili estis la juda bankisto Mateo Rosen (1812-65), kiu intime kunlaboris kun grafo Andreo Zamoyski (1800-74), kiu estis konsiderata kiel gvidanto de la grundposedanta kampara nobelaro. La pentraĵo estas bona pruvo por montri, ke la judoj estis inkluzivitaj en la festaktojn, kio signifas, ke ili formis parton de la nacia memoro kaj ne troviĝis ekster la pola socio. Ekzemple la rabeno Meisel konfesis sian solidarecon de la judoj kun la poloj ĝuste ankaŭ ĉe la klopodoj por la pola libereco. Ankaŭ post 1856 li daŭre subtenis la polan aferon. Inverse, Zamoyski petis lin en la nomo de la judoj varbi ĉe la caro por pli da politikaj liberecoj por Pollando. La mesaĝo de la pentraĵo de Lesser do devis ilustri, ke en Pollando de 1861 poloj kaj judoj formis komunan nacion, kvankam ĉiu sciis, ke ekzistis nur unu ebla (pola) nacio, formita de la ŝlaĥto, konsistanta el la nobelaro (kaj la eklezio), dum la judoj ne devis esti reprezentataj en ĝi. Sed grafo Aleksandro Wielopolski, la gvidanto de la registaro de Kongresa Pollando, kontribuis per cedoj favore al la judoj, garantiante al ili la loĝrajton, kio fakte efektiviĝis la 25an de majo 1861. Tio kaŭzis, ke la malkontenta pola nobelaro malfidis al li kaj al la urba loĝantaro, kiu timis la judan konkurencon. La porjuda movado atingis sian kulminon, kiam la judoj ricevis la juran egalrajtecon en la 5a de junio 1862.

La situacio ŝanĝiĝis post la popola ribelo de 1863/64, kiu estis pli forte apogita de judoj ol tiu de 1830/3. Kiam kadre de la diskuto pri la „pozitivismo“ estis postulate, ke oni devus pli bone utiligi la resursojn de la lando, des pli ke la industriigo dinamike prosperis, la aferoj moviĝis antaŭen, direktante sin ankaŭ kontraŭ la eksterlanda konkurenco, kaj la judoj. Per la proklamo de la libera trafiko inter la Ruslanda Imperio kaj Kongresa Pollando, la alfluo de judoj en la ekonomie prosperan polan landon fariĝis pli facila. Precipe post la pogromoj, kiuj okazis en 1881 en multnombraj urboj de Ukrainio, la judoj amase moviĝis el la ruslanda provinco al la ĉefurbo de Pollando, Varsovio, kiu estis ankaŭ la ĉefurbo de la asimiliĝo. En decembro 1881 ĉi tie eksplodis kontraŭjuda pogromo, kiu daŭris plurajn tagojn kaj kiu estis sufokita de la carismaj aŭtoritatoj nur kun prokrasto. Al tiuj pogromoj eble kontribuis la cirkonstanco, ke la poloj estis provokitaj pro tio, ke la judaj komercistoj ne fermis siajn vendejojn okaze de katolikaj festotagoj. Simon Dubnov (1860-1941), elstara historiisto de la juda popolo, detale raportis pri la evento (1971, 3a vol., p. 477s.): „Je la unua kristnaska tago en la tieaj preĝejoj eksonis falsa incendia alarmo, kaj sennombraj kredantoj estis mortigitaj. Tiam disvastiĝis la onidiro, ke oni arestis du krimulojn, kiu laŭdire estis judoj. La urba plebaĉo tuj atakis la judajn preterpasantojn kaj entreprenis laŭ rusa modelo sturmatakon kontraŭ la judaj vendejoj, restoracioj kaj loĝejoj. La gvidantoj de la pogrombandoj estis konataj ŝtelistoj, sed ankaŭ obskuraj figuroj, kiuj ŝajnis procedi laŭ ellaborita plano. Rimarkinde estis, ke parto de ili bone parolis la rusan. Sekvatage la pogromo kaptis la tutan urbon, kaj nur tiuj stratoj, kiuj estis plej dense loĝataj de judoj, kie la atakitoj defendis sin, restis netuŝitaj de la detruemo de la marodantoj. Kiel fariĝis kutimo en Ruslando, la aŭtoritatoj reagis nur du-tri tagojn poste. Proksimume 1500 judaj loĝejoj, vendejoj kaj preĝejoj estis intertempe detruitaj kaj 24 judoj estis vunditaj. La kaŭzita damaĝo kostis milionojn.“ Kiel Dubnov notis, la gvidantoj de la nacia pola supra tavolo distanciĝis kune kun la katolika ĉefepiskopo de la ‚rusa' pogromo.

Tiel, judoj fariĝis seriozaj konkurentoj sur la industria kampo kaj en la banka sektoro. Tio havis malagrablajn konsekvencojn. Al judoj oni riproĉis, ke ili lasis sin ‚aĉeti' per la carisma propono asimiliĝi. Tiel aperis la unuaj postuloj bojkoti judajn varojn. Sur la kampoj de la kulturo, kies klopodoj direktis sin kontraŭ la rusiga politiko, la judoj estis inkluzivitaj en la koncepto de la nacia integrado, des pli ke ilia ekonomia potenco estis konsiderata kiel utila kaj profitdona. La espero de la ‚pozitivistoj', ke la judoj asimiliĝos, ke ili rezignos pri siaj tradicioj, sia jida lingvo kaj eĉ pri sia religio, estis seniluziigitaj. Anstataŭ integriĝo okazis diskriminacio. Fine de la 19a jarcento la judfobia etoso kaptis vastajn mediojn de la pola publiko. La kompreno pri la nacio estis mallarĝigita: Al la pola nacio povis aparteni nur tiuj, kiuj plenumas certajn kondiĉojn kiel la adaptiĝo kaj portas kulturajn karakterizaĵojn kiel la lingvon. Krom tio, oni riproĉis al la judoj, ke ili malrespektas la polajn kondiĉojn kaj fariĝas helpantoj, komplicoj kaj profitantoj de la rusa politiko. Pro tio la judoj, kiuj migris de Ruslando al la pola parto (al tiuj apartenis ankaŭ la Zamenhofa familio), alfrontis malamikan sintenon en la nova lando. Kiam komence de la 20a jarcento tiu migrado al Kongresa Pollando amase kreskis, la antisemitismaj polemikistoj reagis per nigrapentrado de la „litvakoj“ (tiel nomiĝis la judoj, kiuj venis el la iamaj litovaj

regionoj al Pollando; ankaŭ la Zamenhofoj apartens al ili) laŭ plej malhelaj koloroj, riproĉante al ili, ke tiuj nomadoj kaj bruaj duonbarbaroj ŝovis sin nedezirate kaj senrajte inter poloj kaj *polaj judoj*. Tiujn problemojn Zamenhof traktis en sia hilelismo de 1901. La malkleraj judoj, reduktitaj al sia rolo kiel komercistoj kaj liverantoj de varoj, neniam povis esti agnoskitaj kiel kuracistoj aŭ advokatoj, sed, male, oni eĉ riproĉis al ili, ke ili lernas la polan lingvon nur por maski sin antaŭ la poloj, por ke tiuj ne povu rekoni ilin. Kvankam ili portas nomojn kiel Moseo kaj Isako, ili ŝtelas la nomojn de sanktuloj de la katolika eklezio por resti nekonataj kaj mensoge adapti sin, pro kio ili estas malamataj de la poloj. Eĉ se la judoj lekus la manojn de poloj kaj alkroĉus sin al ilia felo, la poloj senlime malrespektus ilin. **Ne, la judoj havas nenion komunan kun la judoj, rimarkigis Zamenhof, el judo neniam povas fariĝi polo, kaj la judoj iru tien, kie ili devus esti, al Palestino.**[17]

Ankaŭ refreŝiĝis la imago, ke nur katolikoj povas esti veraj poloj. Je la kulmino de la religia naciismo eĉ cirkuladis la skizofrenia vidpunkto, ke la judo Jesuo verŝajne parolis la polan. La katolika eklezio daŭre ludis gravan rolon kiel nacia institucio kaj restis instanco kun alta aŭtoritateco. Kiel ofte en la historio, parto de la katolika ekleziularo vere provokis la malamikecon de la judoj. La judfobia ondo de la poloj trafis la judojn kiel ŝoko. Ene de la judaro, kiu sentis sin minacata, okazis diferenciĝo. Kamparanaj judoj estis devigitaj forlasi la vilaĝojn kaj translokiĝi al la urboj, kie ili amasiĝis kaj konkurencis unu la aliajn en neeltenebla maniero. Dum malgranda parto formis la superan tavolon kaj alia parto la mezan tavolon, la granda plimulto de la judoj estis povraj mizeruloj kaj pli kaj pli malriĉiĝis, kio senigis ilin de la vivobazo. En la sekvo la interna juda diskuto gajnis novan signifon. La judoj klopodis redifini sian lokon en la pollanda socio, rezignante pri siaj malnovaj manieroj por adaptiĝi al la poleco, kiuj fariĝis eksmodaj kaj sensencaj.

Koncerne la politikan antisemitismon en Pollando estis precipe Jan Jeleński, kiu elpaŝis kun siaspecaj programaj verkaĵoj, dum verkisto kiel Boleslavo Prus (Aleksandro Głowacki), kun kiu Jeleński polemikis, evitis esprimi vulgaran antisemitismon. Alia verkisto, Aleksandro Świętochowski, la ‚ideologo' de la pozitivismo, riproĉis al la judoj, ke ili ne sufiĉe asimiliĝis. Kiel ĉefa politika protagonisto de la pola antisemitismo fifamiĝis Roman Dmowski, kiu en 1912 alvokis al bojkoto de judaj entreprenoj. Dmowski neis al la judoj ĉian eblon asimiliĝi en la pola ĉirkaŭaĵo kaj kulpigis ilin pri la mizera stato de Pollando.



Judaj aktivuloj Simon Dubnov, Karl Kautsky, Otto Bauer, Leo Pinsker, Theodor Herzl, L.L.Zamenhof

## Orientjuda reorientiĝo

En 1897 en la Rusa Imperio estis nombritaj entute 5,2 milionoj da judoj, de kiuj 4,9 milionoj vivis en la loĝzono. Post 1882 ankoraŭ 13,5% vivis en la kamparo. La tipa vivspaco de la juda loĝantaro estis la ‚ŝtetlo', do la urbeto, kie la judoj ankaŭ precipe vivis inter si sed rilatis ankaŭ kun aliaj loĝantoj. La industriigo kaj kapitalismigo de la lando kondukis ankaŭ inter la judoj al laŭklasa diferenciĝo kaj al malriĉiĝo de la urbaj amasoj. Judaj laboristoj, metiistoj, grandaj kaj malgrandaj komercistoj formis en la grandurboj fortan sed socie malpli homogenan tavolon, kiu finfine estis kuntenata de la komuna religio kaj kulturo.

Samtempe okazis io stranga, nome kvazaŭa turniĝo de la konscio ĉe la judoj je 180 gradoj. Post kiam fariĝis evidente, kie ilia asimiliĝo fiaskis en Ruslando kaj Pollando, ankaŭ la judoj decidis, apud


17 Hilelismo 1901, kap. II.

aliaj etnaj minoritato, renovigi sian konscion en nacia senco. Krom la demando de la kunekzistado de la juda kaj pola kulturoj nun pli kaj pli grandan signifon gajnis la demando pri la propraj valoro, memkompreno kaj emfazado de la judeco. Tiu rekonsciiĝo komenciĝis de la deziro de la konservado de la propraj tradicioj, lingvo kaj lernejoj kaj finiĝis ĉe la postulo de propra politika aŭtonomeco kaj de aŭtonoma reprezentado kiel tio okazis en la tempo de la malnova Vado, la juda parlamento en iama Pollando. Kiel Pinkwasser konkludis en sia zurika disertacio de 1919/20, la ‚juda demando' en Pollando, kiun li nomis kun Herzl „prokrastita peco de la mezepoko“, devis esti traktata kiel demando de nacia minoritato. Kiel tia ĝi devis esti demando de la interna politiko kaj rilati al la konstitucio. La pola judaro estis nacia minoritato, kiu gvidis propran nacian kaj kulturan vivon kaj konscie izoliĝis de la ĉirkaŭaĵo. La volo aparteni al la sama kaj unusola komunumo vere forte ekzistis ĉe la judoj. Nur malgranda parto de la judoj estis asimilitaj. Ŝajne ekzistis nevenkebla abismo inter poloj kaj la juda minoritato, kiu pridubigis la ekziston de nacio konsistanta el pluraj etnaj minoritatoj. Kiel la poloj restis poloj sub la rusa regado, tiel ankaŭ la judoj ne povis esti sennaciigitaj aŭ ‚senjudigitaj' inter la poloj. Altrudi al ili la polan lingvon per leĝo estintus sensenca klopodo, kondamnita al fiasko. Pro tio la dissolviĝo de la judoj en la pola etno ne estis pensebla, ĉar ŝajnas, ke la judoj ne lasis sin absorbi de aliaj etnoj. Tiu perspektivo faras la rifuzon de Zamenhof aparteni al la poloj kaj lian eksplicitan neadon de sia poleco plene komprenebla. Gravan kaŭzon de la malhelpo, ke la polaj judoj asimiliĝu, Kautsky vidis en la klera supereco de la judoj.

Politike aktivaj judoj revis pri tio, ke en la estonta parlamento de Ruslando aŭ Pollando ili povos esti reprezentataj per propraj judaj partioj. Signifaj signaloj kaj gravaj impulsoj eliris ankaŭ el la ‚Unuiĝo por atingi la egalrajtigon de la juda popolo en Ruslando', kiu estis fondita dum la revolucio de 1905 kaj inter alie postulis la elektorajton por la judoj. Kvankam ĝi malfondiĝis post unujara ekzistado, la konscio pri komunaj politikaj interesoj restis konservata. La cionismo, kiu estis kvazaŭ la nacia movado de la judoj, celis la egalrajtigon de la judoj, la plibonigon de ilia situacio kaj la elmigradon al Erec Israel, la spirit-kultura centro de la judaro. La ‚naciaj judoj' interpretis la historion de la juda popolo kiel vojon de triba komunumo tra ŝtatnacio al kulturnacio, kiu devis integriĝi kiel aŭtonoma nacio en la socion de ĉiu ‚gastiganta lando'. Multaj judoj, kiuj asimiliĝis en Okcidento, komencis vidi sin kiel memstaran popolgrupon, analoge al saksoj, bavaroj aŭ alsacanoj. Kiel tria forto ekzistis la socialistoj („bundistoj“), kiuj koncentriĝis al la judaj laboristoj kaj la proletaro por konservi ilin por la juda kulturo sen anstataŭigi ilin per la klasa koncepto. Ankaŭ ili pledis por propra ludmaniero de la juda aŭtonomeco kadre de federacio kun aliaj naciecoj de la Ruslando Imperio. Ekestis nova ento – tiu de la (konservemaj kaj tradiciaj) ‚orientaj judoj', kiu devis kulturtipe distingi ilin de la (pli modernaj, asimilitaj kaj burĝiĝintaj) ‚okcidentaj judoj'.

La plej gravaj kulturaj protagonistoj de tiu orientjuda tendenco estis *Mendel Mojĥer Sforim*, *Jichok Leib Perec* kaj *Ŝolem Alejĥem*, kiuj estis signifaj judaj verkistoj. Ilia celo estis, ke la jida lingvo estu agnoskita kiel unu el la naciaj lingvoj de la juda popolo. La ‚jidismo' fariĝis speco de ideologio. Ankoraŭ antaŭ la jaro 1900 la moderna juda historiografio povis esti fondita kaj establita far Simon Dubnov per ties ĉefverko ‚Monda historio de la juda popolo', kies unua parto aperis en 1904-6 kaj en 1914 en Sankt-Peterburgo en la rusa lingvo.[18] Sed la judaro de orienta Eŭropo estis tro heterogena kaj nekohera amaso por povi evolui al translanda nacio. Simple ekzistis tro multaj unuopaj grupoj, kies imagoj pri nacio ne ĉiam koincidis. Dum ekzemple Otto Bauer, kiu okupiĝis pri la demando de la naciecoj, jesis la demandon, ĉu la judoj ĝenerale kaj la orientaj judoj aparte formas unu komunan nacion, Karl Kautsky, kiu verkis traktaĵon pri la kiŝinjova pogromo de 1903, rifuzis interkonsenti kun Bauer. Reage al la progromoj alia interesa juda ideologo, Leo Pinsker, kiu verkis la manifeston „Aŭtoemancipiĝo“ (1882) konkrete traktis la postulon starigi nacian ŝtaton de la judoj kaj per tio preparis la bazelan deklaron de Herzl, kiu sekvis en 1897.

[18] En la germana lingvo la verko aperis en 1925-29 en Berlino, en ivrito en 1923-38 kaj en la jida lingvo en 1948-58. Plena ruslingva eldono aperis en 1934-38 en Riga.

Mendel Mojĥer Sforim, Jichok Leib Perec kaj Ŝolem Alejĥem

Sed la socialismo kaj cionismo puŝis la judojn antaŭen. Dum en la unua Dumao de julio 1906 la judoj estis tamen reprezentitaj per 12 deputitoj; tiu parto falis al 4-6 en la dua Dumao de 1907 (anstataŭe ĉeestis 6 muzulmanoj!). Do, en Ruslando la emancipiĝo de la judoj fiaskis samtempe kun la pereo de reĝimo, kiu kauzis al la judoj tiom da problemoj (laŭ Solĵenicyn ne sen la kulpo de la judoj emm), politike subpremadis ilin dum jarcentoj, humiligis ilin per ĉikanoj kaj diskriminaciis ilin per specialaj leĝoj, izolis ilin en la socio kaj mistraktis ilin dum pogromoj. Pro siaj sciencaj sukcesoj, ilia konstanta obstineco kaj forta reprezentado en certaj profesiaj branĉoj, la judoj devis elteni socian envion, malfidon kaj malamon. François Fejtö priskribis la situacion de la judoj de la cara imperio en la tempo de la ruslanda revolucio jene:

„Pro sia obstina rifuzo agnoski Kriston kaj ties rolon kiel peranto, la judoj staris komplete ekster la granda kristana movado, ili kaŭzis ĉagrenon kaj koleron, kiujn ili eĉ mem provokis. Kiel popolo de la profetoj, kiel Péguy nomis ilin, kiel elektita popolo, la judoj kaŝis sin paŭte malantaŭ sia ‚alieco', ili estis enklavo en la kristanaro, ligata al siaj leĝoj kaj ‚akceptebla patrujo' (kiel Heine nomis ĝin). Per paradoksa espero ili preparis sin je la alveno de la mesio, kio nature kaŭzis kritikon ĉe la kredantaj kristanoj. La judoj signifis historian defion, ili estis ‚kapricaĵo' de la historio el longe pasintaj tempoj, kiu obstine pluekzistadis, celante konservi sian pretendon je la ‚konkludiĝo de la tempo'. Kaj en la maltoleremo, kiun ili kutime renkontis, la judoj rifuzis ankaŭ vidi la pruvon, ke la kristanismo estas vere kristana kaj ke la religio de la amo tute ne malaperigis la malamon de la homoj. Oni povas diri: Eĉ se la judoj estis tiel malrespektataj, humiligataj kaj persekutataj, por ili tio estis – en la senfina kverelo kun la kristanismo – tamen daŭra fonto de la triumfo, nesuperebla pravigo de ilia neado kaj garantio por ilia pluvivado."

De 1911 ĝis 1913 en Kievo okazis la skandala murdproceso kontraŭ Menaĥem Mendel Beilis, kiu akiris internacian atenton pro la akuzo pri juda ritualmurdo en la kazo de kristana infano. Pro manko de pruvoj Beilis estis absolvita kaj liberigita en tiu proceso, kiu estas konsiderata kiel plej lasta ritualmurd-proceso kontraŭ iu judo.

La Unua Mondmilito komenciĝis la 28an de julio 1914 per la militdeklaro de Aŭstrujo-Hungarujo kontraŭ Serbujo. Ĝin antaŭis la fama atenco de Sarajevo de la 28a de junio 1914, en kiu la aŭstra-hungara sukcedanto Francisko Ferdinando kaj lia edzino Sofio estis mortigitaj de radikala bosni-serba revoluciulo. La 30an de julio Ruslando ordonis la ĝeneralan mobilizadon de sia armeo por subteni Serbujon. Post tio, la 1an de aŭgusto la Germana Regno, kiu apogis sian aŭstran-hungaran aliancanon, proklamis la militon kontraŭ Ruslando. En la vespero de la sama tago rusaj kavalerianoj transiris la orientprusan limon. La ĝenerala militeŭforio, kiu estis bizara karakterizaĵo de tiu novtipa mondbrulo, en kiu la popoloj amase buĉis unu la aliajn kaj en kiu oni ne hezitis apliki ankaŭ venenan gason, estis lanĉita kaj konis neniujn limojn.

La genezon de tiu freneza milito Simon Dubnov priskribis en la unua ĉapitro de la kvara libro de sia ‚Monda historio de la juda popolo' jene:

„En la nomo de la miskomprenata principo de la nacia ŝtato la ŝtata naciismo volis altrudi al la fremdtribanoj, same kiel oni faris tion al alireligianoj en la epoko de la religiaj militoj, la kredon, lingvon kaj kulturon de la reganta nacio, kio pelis ankaŭ la subprematajn naciajn minoritatojn al fanatika naciismo de la sindefendo. Al tiu ŝovinismo, kiu grave misformis la sanan nacian senton, aldoniĝis la lukto inter la laboro kaj kapitalo, do la klasbatalo, kiu akriĝis en sama grado. La nacia vanteco kaŭzis deflankiĝon de la efektivigo de grandanimaj sociaj reformoj. Tiel, la eksplodaĵo iom post iom amasiĝis, tiel ke en 1914 estis lanĉita la mondmilito kaj post tio la teruro de la eŭropaj intercivitanaj militoj.“

Je la militfino 25 ŝtatoj kaj ties kolonioj, en kiuj vivis entute 1,35 miliardoj da homoj, do ĉirkaŭ tri kvaronoj de la tiama monda loĝantaro, troviĝis en la milita stato. Surbaze de la eksterordinara senmoraleco, kiun la „Granda Milito“, kiel la unua mondmilito estis nomata, internacie kaŭzis, kaj ties sekvoj, multaj konsideras tiun ĉi militon „prakatastrofo de la 20a jarcento“. La unua mondilito kaŭzis preskaŭ dek milionojn da mortintoj kaj ĉirkaŭ 20 milionojn da vunditoj inter la soldatoj. La nombro de la civilaj viktimoj estas taksitaj je sep milionoj da homoj. La Ruslanda Imperio engaĝis ĉirkaŭ 12 milionojn da viroj por la militservo, de kiuj mortis 1,85 milionoj, kio korespondas al 15 procentoj de la konsisteco de la armeo. La ciferoj por Germanio estas du milionoj da mortintaj soldatoj de 13,24 milionoj kun sama procentaĵo de perdoj. Aliaj landoj, kiuj partoprenis en la milito, suferis laŭprocente eĉ pli altajn perdojn. La milito kostis al ĉiuj partprenantaj potencoj preskaŭ unu bilionon da oraj markoj. De Gaulle postlasis la legendecan frazon: ***Estis venkintoj kaj malvenkintoj, sed ni ĉiuj malgajnis.***

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, 2017

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979.